

The Project Gutenberg EBook of Puphejmo, by Henrik Ibsen

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org)

Title: Puphejmo  
Dramo en tri aktoj

Author: Henrik Ibsen

Translator: Odd Tangerud

Release Date: August 12, 2006 [EBook #19030]

Language: Esperanto

Character set encoding: UTF-8

\*\*\* START OF THIS PROJECT GUTENBERG EBOOK PUPHEJMO \*\*\*

Produced by William Patterson, Robert L. Read and Andrew Sly.

HENRIK IBSEN

PUPHEJMO

Dramo en tri aktoj

(Et Dukkehjem)

(1879)

Tradukis  
Odd Tangerud

LINGVE KONTROLITA DE  
ESPERANTISTA VERKISTA ASOCIO  
(EVA)

Dua eldono

1998

Eldonejo: Jec Scandinavia a/s  
Postboks 54, N - 3401 Lier  
Tlf.. 32 85 50 03. Fax. 32 85 50 82  
ISBN 82-991075-2-0

PUPHEJMO

Roloj:

TORVALD HELMER, advokato

# **Livros Grátis**

<http://www.livrosgratis.com.br>

Milhares de livros grátis para download.

NORA, lia edzino  
RANK, doktoro (kuracisto)  
KRISTINE LINDE, vidvino  
NILS KROGSTAD, juristo  
La tri malgrandaj infanoj de la familio Helmer  
ANNE-MARIE, infanvartistino  
HELENE, ĉambristino  
Portisto

(La agado havas lokon en la hejmo de la familio Helmer dum tri kristnaskaj tagoj. Kristnaska vespero, la 24-an de Decembro, komencas la festotagojn memore al la naskiĝo de la kristana profeto Jesuo Kristo. Ibsen uzas la antikvan skandinavan nomon "Julo" por tiu religia festo.)

#### UNUA AKTO

(Hejmeca kaj agrabla, sed ne lukse meblita ĉambro. Pordo dekstre en la fono kondukas al la antaŭĉambro; alia pordo maldekstre fone kondukas al la oficejo de \_Helmer\_. Inter tiuj pordoj estas piano. Meze de la maldekstra muro estas pordo, kaj pli antaŭe estas fenestro. Ĉe la fenestro estas ronda tablo kun brakseĝoj kaj malgranda sofo. Sur la dekstra muro, iom malantaŭe, estas pordo, kaj iom pli antaŭe estas kaŝela forno, apud kiu estas brakseĝoj kaj balanca seĝo. Inter la forno kaj la flankaj pordo estas tableto. Kuprogravuraĵo sur la muro. Etaĝero kun porcelanaĵoj kaj aliaj malgrandaj artaĵoj; malgranda libroŝranko kun libroj lukse binditaj. Tapiŝo sur la planko; fajro en la forno. Vintrotago.)

(Oni sonorigas en la antaŭĉambro; poste oni aŭdas ke iu malfermas. \_Nora\_ envenas, kontente kantetante; ŝi estas vestita elirveste kaj portas plurajn paketojn, kiujn ŝi metas sur la tablon dekstre. Ŝi lasas malferma la pordon post si, kaj oni vidas portiston, kiu portas Julpiceon kaj korbon, kiujn li donas al la ĉambristino, kiu malfermis por ili.)

NORA. Kaŝu bone la Jularbon, Helene. La infanoj nepre ne vidu ĝin antaŭ la vespero, kiam ĝi estos ornamita. (al la portisto; elprenante la monujon) Kiom --?

PORTISTO. Kvindek oerojn.

NORA. Jen unu krono. Ne! Vi prenu la tuton.

(La \_portisto\_ dankas kaj foriras. \_Nora\_ fermas la pordon. Ŝi daŭre ridas mallaŭte kaj kontente dum ŝi deprenas la supervestojn)

NORA (prenas papersaketon kun makaronoj el la poŝo kaj manĝas kelkajn; poste ŝi iras piedpinte kaj ŝtelaŭskultas ĉe la pordo de sia edzo). Jes, li estas hejme. (kantetas denove irante al la dekstra tablo)

HELMER (en sia ĉambro). Ĉu estas la alaŭdeto, kiu kvivitas tie?

NORA (malfermante kelkajn paketojn). Jes, estas.

HELMER. Ĉu estas la sciureto, kiu ĉirkaŭkuras tie?

NORA. Jes!

HELMER. Kiam revenis la sciureto!

NORA. Ĝus nun! (metas la saketon kun makaronoj en la poŝon, kaj viŝas sian buŝon) Venu, Torvald, kaj rigardu kion mi aĉetis.

HELMER. Ne ĝenu min! (iom poste; malfermas la pordon, rigardas, tenante plumon) Aĉetis, vi diras? Ĉion ĉi? Do mia disipa birdeto flirtis denove malŝparante monon!

NORA. Jes, sed, Torvald, ĉi-jare ni vere povas iom senbridiĝi. Estas ja la unua Julfestoj, kiam ni ne bezonas ŝpari.

HELMER. Nu, nu! Malŝpari ni ne povas.

NORA. Tamen, Torvald, iomete ni nun povas malŝpari, ĉu ne? Nur etan iometon. Vi ja ricevos grandan salajron kaj gajnos multe, multe da mono.

HELMER. Jes, ekde novjaro; sed poste pasos kvarona jaro antaŭ nova salajrodato.

NORA. Pa! Ni povas ja pruntepreni intertempe.

HELMER. Nora! (proksimigas sin al ŝi kaj ŝerco pinĉas sian orelon) Ĉu estas la facilanimeco kiu denove ludas? Supozu ke mi hodiaŭ prunteprenis mil kronojn, kaj vi elspezis ilin dum la Julsemajno, kaj ke novjarvesperon tegolo trafis al mi la kapon, kaj jen finite pri mi --

NORA (kovras lian buŝon per sia mano). Ho fi! Ne parolu tiel malbele!

HELMER. Supozu ke io simila okazus, -- kio poste?

NORA. Se io tiel terura okazus, estus tute egale por mi ĉu mi havus ŝuldojn aŭ ne.

HELMER. Nu, sed la personoj de kiuj mi pruntis?

NORA. Ili? Kiu zorgas pri ili? Ili estas ja fremduloj.

HELMER. Nora, Nora, vi estas virino! Tamen parolante serioze, Nora, vi scias, kion mi pensas tiurilate. Neniun ŝuldon! Neniun pruntepreni! Hejmo kiu fondiĝas sur ŝuldoj, fariĝos senlibera, do malbela. Ĝis nun ni du kune eltenis brave; kaj tion ni ankaŭ faros dum la mallonga tempo ankoraŭ necesa.

NORA (iras al la forno). Jes ja, kiel vi volas, Torvald.

HELMER (sekvas ŝin). Nu, nu; la kantalaŭdo ne trenu siajn flugilojn. Kio? Ĉu la sciureto staras tie paŭtante? (elprenas la monujon) Nora, divenu kion jen mi havas.

NORA (turnas sin rapide). Monon!

HELMER. Jen rigardu! (donas al ŝi kelkajn monbiletojn) Kara mia, certe mi scias, ke en hejmo dum la Jultempo oni multe bezonas.

NORA (kalkulas). Dek -- dudek -- tridek -- kvardek. Ho, dankon, dankon, Torvald; tio helpas min longe.

HELMER. Jes, vere ĝi devus.

NORA. Jes, jes, vere helpas. Sed venu por ke mi montru al vi, kion mi aĉetis. Kaj kiom malmultekoste! Rigardu, novajn vestojn

por Ivar -- kaj sabron. Kaj jen ĉevalo kaj trumpeto por Bob. Kaj jen pupo kaj pupa lito por Emmy; estas simplaj; sed ŝi ja ĉiuokaze baldaŭ disŝiros ilin. Kaj jen robŝtofo kaj tukoj por la servistinoj; maljuna Anne-Marie devus ja havi multe pli.

HELMER. Kaj kio estas en jena paketo?

NORA (krias). Ne, Torvald, tiun vi nur rajtas vidi ĉi-vespere!

HELMER. Nu, tiel. Sed diru nun al mi, vi malŝparulineto, kion vi pensis por vi mem?

NORA. Pa! Por mi? Mi tute nenion deziras.

HELMER. Certe vi ion deziras. Menciu al mi ion moderan, kion vi pleje ŝatus havi.

NORA. Ne, mi vere ne scias. Ho jes, aŭdu, Torvald

HELMER. Nu?

NORA (palpante liajn butonojn; sen lin rigardi). Se vi volus doni ion al mi, vi povus --; povus --

HELMER. Nu, nu, eldiru.

NORA (rapide). Vi povus doni al mi monon, Torvald. Nur tiom kiom vi opinias, ke vi povas malhavi; kaj poste, iun tagon mi aĉetos ion.

HELMER. Sed vidu, Nora --

NORA. Ho jes, kara Torvald, faru; mi ege petas vin pri tio. Kaj mi pendigus sur la Jularbon la monon enpakitan en ora papero. Ĉu ne estus amuze?

HELMER. Kiel oni nomas tiujn birdetojn, kiuj ĉiam malŝparas monon?

NORA. Jes, jes, monludantojn; mi ja scias. Tamen ni faru kiel mi diras, Torvald; kaj mi havos tempon por pripensi kion mi pleje bezonas. Ĉu ne estas tre saĝe? Ĉu?

HELMER (ridetante). Certe estas; kondiĉe ke vi vere kapablas reteni la monon, kiun mi al vi donas, kaj vere aĉetus ion por vi mem. Sed foje ĝi malaperas en la mastrumado, kaj foje ĝi forflirtas por aliaj superfluaĵaj aĉetoj, kaj jen mi devas denove elspezi.

NORA. Tamen, Torvald --

HELMER. Vi ne povas nei, mia kara Nonja. (metas la brakon ĉirkaŭ ŝian talion) La ludanta birdo estas dolĉa; sed ĝi forludas tre multe da mono. Estas nekredeble multekoste por edzo teni ludbirdon.

NORA. Fi, kial vi diras tion? Mi vere ŝparas ĉion, kion mi kapablas.

HELMER (ridetas). Jes, trafa diraĵo. Ĉion kion vi kapablas. Sed vi tute ne kapablas.

NORA (kantetas kaj ridetas silente kontenta). Mmm, se vi nur scius kiom da elspezoj ni alaŭdoj kaj sciuroj havas, Torvald.

HELMER. Vi estas stranga etulino. Tute sama kia estis via patro. Vi ĉirkaŭflaras ĉie por havigi al vi monon; sed tuj kiam vi havigis ĝin, ĝi kvazaŭ malaperas inter viaj manoj; vi neniam scias, kie vi elspezis la monon. Nu, oni devas akcepti vin, kia vi estas. Kuŝas en la sango. Ja, ja, ja, tio estas hereda, Nora.

NORA. Ha, mi dezirus, ke mi estus heredinta multajn el la kvalitoj de paĉjo.

HELMER. Kaj mi ne dezirus vin alia ol ĝuste kia vi estas, mia dolĉa, eta kantalaŭdo. Sed aŭskultu; suspekto sin prezentas. Vi aspektas hodiaŭ tiel -- tiel -- nu kiel mi nomu tion? -- tiel ruzeta --

NORA. Mi, ĉu?

HELMER. Jes vere vi aspektas. Rigardu min fikse en la okulojn.

NORA (rigardas lin). Nu?

HELMER (minacas per la fingro). Ĉu eble la eta frandemulino ekscesis en la urbo hodiaŭ?

NORA. Ne, kial vi pensas tiel?

HELMER. Ĉu eble la frandemulineto vere ne faris kromviziton al la sukeraĵisto?

NORA. Ne, mi certigas al vi, Torvald --

HELMER. Ne lipis iom da konfitaĵo?

NORA. Ne, tute ne.

HELMER. Eĉ ne gustumis makaronon aŭ du?

NORA. Ne, Torvald, mi vere certigas al vi --

HELMER. Nu, nu, nu; kompreneble mi nur ŝercas --

NORA (iras al la dekstra tablo). Mi vere ne ekpensus agi kontraŭe al vi.

HELMER. Ne, mi scias ja tion; kaj vi ja promesis al mi --. (proksimiĝas) Nu, tenu viajn etajn Julsekretojn por vi mem, mia kara Nora. Ili certe malkaŝiĝos en la vespero ĉe la eklumigita Jularbo.

NORA. Ĉu vi memoris inviti doktoron Rank?

HELMER. Ne. Sed ne estas necese; estas ja memkompreneble, ke li manĝos kune kun ni. Cetere mi invitos lin, kiam li alvenos antaŭtagmeze. Bonan vinon mi mendis. Nora, vi ne povas imagi kiom mi antaŭguas la vesperon.

NORA. Ankaŭ mi. Kaj kiom la infanoj ĝojegos, Torvald.

HELMER. Ho, estas grandioze pripensi, ke oni havas sekuran, solidan oficon; ke oni havas abundan enspezon. Estas ĝuiga penso, ĉu ne?

NORA. Ho jes, estas mirinde!

HELMER. Ĉu vi memoras pasintan Julon? Dum tutaj tri semajnoj antaŭe vi enfermis vin en via ĉambro ĉiun vesperon ĝis malfrue

post meznokto por fari florojn por la Jularbo kaj ĉiujn aliajn mirindaĵojn, per kiuj vi volis surprizi nin. Hu, estis la plej enuiga tempo, kiun mi iam travivis.

NORA. Kontraŭe mi tute ne enuis.

HELMER (ridetante). Sed la rezulto estis milde dirite iom modesta, Nora.

NORA. Nu, nu; jen vi denove incitetas min pri tio. Ĉu mi kulpus pri tio, ke la kato envenis kaj disŝiris ĉion?

HELMER. Certe ne, mia kompatinda Nonja. Vi plej volonte emis ĝojigi nin ĉiujn, kaj tio estas la ĉefa afero. Sed estas bone, ke tiu tempo de malriĉeco estas pasinta.

NORA. Ho jes, estas vere ĝojige.

HELMER. Nun mi ne bezonas sidi ĉi tie sola kaj enui; kaj vi ne bezonas turmenti viajn benitajn okulojn kaj viajn etajn, delikatajn manojn --

NORA (manklakas). Ne, ĉu ne, Torvald, tion ni ne plu bezonas? Ho kiel mirinde bone estas tion aŭdi! (prenas lian brakon) Nun mi konfidu al vi kiel mi intencas ĉion aranĝi, Torvald. Tuj post la Jultagoj -- (oni sonorigas) Ha! sonoras! (ordigas iom en la sidĉambro) Iu venos. Nu do, ĉagrene!

HELMER. Por vizitoj mi ne estas hejme; memoru tion.

ĈAMBRISTINO (ĉe la enireja pordo). Sinjorino, venas fremda virino --

NORA. Enlasu ŝin.

ĈAMBRISTINO (al \_Helmer\_). Kaj la doktoro venis samtempe.

HELMER. Li iris rekte en mian ĉambron, ĉu?

ĈAMBRISTINO. Jes, li tien iris.

(\_Helmer\_ iras en sian ĉambron. La \_ĉambristino\_ enlasas \_sinjorinon Linde\_, kiu estas vojaĝvestita, kaj fermas post ŝi)

LINDE (sinĝena kaj iom hezitanta). Bonan tagon, Nora.

NORA (necerta). Bonan tagon --

LINDE. Vi eble ne rekonas min.

NORA. Ne; mi ne scias -- nu jes, ŝajnas al mi -- (ekkrias) Sed? -- Kristine? Ĉu efektive estas vi?

LINDE. Jes, estas mi.

NORA. Kristine! Kaj mi kiu ne rekonis vin! Sed kiel do povis mi --? (iom malrapide) Kiom vi aliiĝis, Kristine!

LINDE. Jes, verŝajne -- aliiĝis. Dum naŭ -- dek longaj jaroj --

NORA. Ĉu pasis tiom da tempo post kiam ni vidis unu la alian? Jes, vere ja estas. Ho, la ok lastaj jaroj estis feliĉega tempo, kreu. Kaj jen vi do venis ĉi tien en la urbon? Faris la longan vojaĝon dumvintre. Brava vi estas.

LINDE. Mi ĵus venis per la vaporŝipo matene.

NORA. Por amuziĝi dum la Julsemajno, kompreneble. Ho, kiom ĝuige! Jes, amuziĝi, tion ni vere faru. Sed deprenu viajn supervestojn. Vi ne frostas, ĉu? (helpas ŝin) Jen; nun ni sidigu nin agrable tie apud la forno. Ne, ne; tien en la brakseĝon! En la balanca seĝo mi volas sidi. (prenas ŝiajn manojn) Jes nun vi ree havas vian antaŭan vizaĝon; estis nur en la unua momento --. Iom pli pala vi fariĝis, Kristine, -- kaj eble iom pli malgrasa.

LINDE. Kaj multe, multe pli maljuna, Nora.

NORA. Jes, eble iomete pli maljuna, iometete; tute ne multe. (haltas subite; serioze) Ho, sed mi senpripensa homo, kiu sidas babilante! Dolĉa, benita Kristine, ĉu vi povas pardoni min?

LINDE. Pri kio vi pensas, Nora?

NORA (malrapide). Kompatinda Kristine, vi ja fariĝis vidvino.

LINDE. Jes, antaŭ tri jaroj.

NORA. Ho, mi tion ja sciis; mi legis pri tio en la gazetoj. Ho, Kristine, kreu min; tiam mi ofte intencis skribi al vi; sed ĉiam mi prokrastis, kaj ĉiam io intervenis.

LINDE. Kara Nora, tion mi bone komprenas.

NORA. Estis ja malafable miaflanke, Kristine. Ho, kompatinda vi! Kiom vi travivis. -- Kaj li neniom postlasis por vin vivteni?

LINDE. Neniom.

NORA. Kaj neniujn infanojn?

LINDE. Neniujn.

NORA. Do vere nenion?

LINDE. Eĉ ne aflikton aŭ sopiron kiel etan konsolon.

NORA (rigardas ŝin dubeme). Tamen, Kristine, kiel tio eblas?

LINDE (ridetas afliktite, kaj tuŝas ŝiajn harojn). Nu, tio foje okazas, Nora.

NORA. Tute sola. Kiom terure peze por vi. Mi havas tri dolĉajn infanojn. Sed nun vi ne povas vidi ilin, ĉar ili eliris kun la vartistino. Tamen, rakontu nun al mi, ĉion --

LINDE. Ne, ne, ne, prefere rakontu vi.

NORA. Ne, vi komencu. Hodiaŭ mi ne volas esti egoisto. Hodiaŭ mi volas pensi nur pri viaj aferoj. Tamen unu novaĵon mi devas diri al vi. Ĉu vi scias pri la granda feliĉo, kiu okazis al ni laste?

LINDE. Ne. Kaj \_kiu\_?

NORA. Pensu, mia edzo nomiĝis direktoro de la Akciobanko!

LINDE. Via edzo? Ho kia ŝanco --!

NORA. Jes ja, ega! Nur esti advokato, tio ja ne estas firma



vivtenado, precipe kiam oni ne volas okupi sin pri aliaj aferoj ol tiuj, kiuj estas honestaj kaj bontonaj. Kaj kompreneble Torvald neniam volis; kaj pri tio mi tute samopinias kun li. Ho, imagu kiom ni ĝojas! Li ekfunkcios en la banko jam de novjaro, kaj tiam li ricevos grandan salajron kaj multajn procentojn. De nun ni povas vivi tute alimaniere ol antaŭe, -- ĝuste kiel ni deziras. Ho, Kristine, kiom mi sentas min ŝveba kaj feliĉa! Ĉar estas ja ĝuige havi multe da mono kaj ne bezoni maltrankviliĝi. Ĉu ne?

LINDE. Jes almenaŭ estus kontentige havi por la necesajoj.

NORA. Ne, ne nur la necesan, sed ege, ege multe da mono!

LINDE (ridetas). Nora, Nora, ĉu vi ankoraŭ ne fariĝis saĝa? Dum la lernojaroj vi estis malŝparulino.

NORA (ridas mallaŭte). Jes, tion diras Torvald ankoraŭ. (minacas per la fingro) Sed "Nora, Nora" ne estas tiel stulta kiel vi pensas. -- Ho, ne estis ĉiam por ni tiel, ke mi povus malŝpari. Ambaŭ devis ni labori!

LINDE. Ankaŭ vi?

NORA. Jes, pri malgravaĵoj; pinglolaro, kroĉado, brodado kaj simile; (aspekte ion aludante) kaj ankaŭ pri aliaj aferoj. Vi certe scias, ke Torvald forlasis la ministerion, kiam ni geedziĝis? Ne estis ŝanco por promocio en lia oficejo, kaj li ja devis enspezi pli da mono ol antaŭe. Sed la unuan jaron li trostreĉis sin tiel terure. Li devis ja serĉi ĉiajn kromenspezojn, kiel vi certe povas kompreni, kaj labori de frue ĝis malfrue. Sed tion li ne eltenis, kaj li fariĝis morte malsana. Kaj jen la kuracistoj deklaris, ke necesas por li iri suden.

LINDE. Jes, vi restis en Italujo tutan jaron?

NORA. Vere jes, sed ne estis facile forvojaĝi, kreu min. Ivar estis tiam ĵus naskita. Foriri ni tamen devis, kompreneble. Ho, estis mirinde ĝuiga vojaĝo. Kaj ĝi savis la vivon de Torvald. Sed kostis tre multe da mono, Kristine.

LINDE. Tion mi ja komprenas.

NORA. Mil ducent talerojn ĝi kostis. Kvar mil okcent kronojn. Jen granda sumo.

LINDE. Jes, sed en tiaj situacioj estas granda feliĉo, ke oni havas la monon.

NORA. Jes, sciu, ni ricevis la sumon de paĉjo.

LINDE. Nu, tiel. Estis ja je tiu tempo ke via patro mortis, mi kredas.

NORA. Jes, Kristine. Kaj pensu, mi ne povis iri al li por lin varti. Ĉiun tagon mi atendadis, ke eta Ivar venos en la mondon. Kaj mi ankaŭ devis varti mian malfeliĉan, morte malsanan Torvald. Mia kara bona paĉjo! Mi ne plu vidis lin, Kristine. Estas la plej peza travivaĵo, kiun mi spertis, post kiam mi edziniĝis.

LINDE. Mi scias, ke vi multe amis lin. Sed jen vi do iris al Italujo?

NORA. Jes, ni havis ja la monon; kaj la kuracistoj urĝis nin. Do, ni forvojaĝis unu monaton poste.

LINDE. Kaj via edzo revenis tute sana?

NORA. Sana kiel fiŝo!

LINDE. Sed -- la doktoro?

NORA. Kiel?

LINDE. Ŝajnas al mi, ke la ĉambristino diris, ke estas la doktoro, tiu sinjoro, kiu alvenis samtempe kun mi.

NORA. Nu! Tiu estas doktoro Rank; sed li ne venas por viziti pacienton; estas nia plej intima amiko, kaj li vizitas nin almenaŭ unu fojon tage. Ne, malsana Torvald ne estis post tiam, eĉ ne horon. Kaj la infanoj estas sanaj, kiel ankaŭ mi. (eksaltas kaj manfrapas) Ho Dio, ho Dio, Kristine, estas vere mirinde vivi kaj esti feliĉa! -- --. Sed fi, estas abomene miaflanke --; mi ja nur priparolas miajn proprajn aferojn. (eksidas sur skabelon tute apud ŝi kaj metas la brakojn sur ŝian genuon) Ho, ne koleru kontraŭ mi! -- Diru, ĉu efektive estas vero, ke vi ne amis vian edzon? Kial vi do akceptis lin?

LINDE. Mia patrino ankoraŭ vivis; sed ŝi kuŝis senhelpe malsana en la lito. Kaj mi devis ankaŭ zorgi pri miaj du pli junaj fratoj. Mi ne trovis, ke estas saĝe rifuzi lian edziĝpeton.

NORA. Ne, ne; eble vi pravas. Do tiam li estis riĉa?

LINDE. Li estis sufiĉe bonhava, mi opinias. Sed estis ne sekuraj aferoj, Nora. Kiam li mortis, ĉio perdiĝis, kaj nenio restis.

NORA. Kaj poste --?

LINDE. Nu, mi devis iel trabati min pere de eta komerco kaj malgranda lernejo, kaj kion mi krome povis elpensi. La lastaj tri jaroj por mi estis seninterrompa, senripoza labortago. Nun ĝi atingis finon, Nora. Mia kompatinda patrino ne plu bezonas min, ĉar ŝi forpasis. Kaj nek la knaboj; ili havas oficojn kaj povas zorgi pri si mem.

NORA. Kiom vi devas senti vin senŝar --

LINDE. Ho ne! -- nur tiom senmezure superflua. Neniun por kiu plu vivi. (ekstaras malkviete) Tial mi ne plu eltenis en tiu solecejo. En ĉi tiu urbo certe estas pli da eblecoj trovi ion, kio povas absorbi min kaj okupi miajn pensojn. Mi dezirus esti tiom feliĉa, ke mi trovus daŭran oficon, iun oficejan laboron --

NORA. Tamen, Kristine, tio estas terure streĉa, kaj vi aspektas sufiĉe streĉita antaŭe. Estus pli bone por vi veni al iu banloko.

LINDE (iras al la fenestro). Mi ne havas paĉjon, kiu povus doni al mi vojaĝmonon, Nora.

NORA (ekstaras). Ho, ne koleru kontraŭ mi.

LINDE (pli proksime). Kara Nora, nun vi ne koleru kontraŭ mi. La plej malbona en situacio kia la mia, estas ke ĝi kaŭzas tiom da amareco en la animo. Oni havas neniun por kiu labori; sed tamen oni devas eltrovi eblecojn ĉiuloke. Oni devas ja vivi; kaj sekve oni fariĝas egoisto. Kiam vi rakontis pri la feliĉa ŝanĝo en via situacio -- kredu -- mi ne tiom ĝojiĝis pro vi, kiom pro mi mem.

NORA. Kiel tio? Ho, nun mi komprenas. Vi opinias, ke eble Torvald povus fari ion por vi.

LINDE. Jes, tion mi pensis.

NORA. Li faru, Kristine. Lasu tion al mi; mi enkondukos la aferon tiel lerte, lerte, eltrovos ion afablan, kion li multe ŝatas. Ho, mi tre ŝatus esti helpa al vi.

LINDE. Kiel afabla vi estas, Nora, ke vi tiom fervoras por mia afero, -- duoble afable de \_vi\_, kiu mem spertis tiom malmulte de la elprovoj kaj problemoj de la vivo.

NORA. Mi --? Mi spertis malmulte, --?

LINDE (ridetante). Nu Dio mia, tiometan pinglolaron kaj tiaĵojn --. Vi estas infano, Nora.

NORA (rektigas la kapon kaj iras plankmezen). Tion vi ne diru tiel arogante.

LINDE. Nu --?

NORA. Vi estas egala al la aliaj. Vi ĉiuj opinias, ke mi taŭgas al nenio grava --

LINDE. Nu, nu --

NORA. -- ke mi elprovis nenion en ĉi tiu malfacila mondo.

LINDE. Kara Nora, vi ja ĵus rakontis al mi ĉiujn viajn travivaĵojn.

NORA. Pa, -- tiujn bagatelojn! (mallaŭte) Mi ne rakontis pri mia granda ago.

LINDE. Kiu granda ago? Al kio vi aludas?

NORA. Vi ignoras min tute, Kristine; sed tion vi ne devus fari. Vi fieras, ke vi laboris tiel streĉe kaj longe por via patrino.

LINDE. Mi vere neniun ignoras. Sed tio estas vero: mi estas fiera kaj ĝoja, kiam mi pensas, ke ebliĝis al mi fari la lastan vivtempon de mia patrino tiel senzorga.

NORA. Kaj vi ankaŭ estas fiera, kiam vi pensas pri via helpo al viaj fratoj.

LINDE. Mi trovas ke tion mi rajtas.

NORA. Tion ankaŭ mi trovas. Sed nun vi aŭdu ion, Kristine. Ankaŭ mi havas kaŭzon por esti fiera kaj ĝoja.

LINDE. Mi ne dubas. Sed al kio vi aludas?

NORA. Parolu mallaŭte. Se Torvald aŭdus, jen imagu! Li devas por neniu prezo en la mondo --; neniu devas scii, Kristine; neniu krom vi.

LINDE. Sed kio do estas?

NORA. Venu ĉi tien (tiras ŝin sur la sofon flanke de si) Aŭdu, -- ankaŭ mi havas kaŭzon por esti fiera kaj ĝoja. Estas mi, kiu savis la vivon de Torvald.

LINDE. Savis --? Kiel savis?

NORA. Mi ja rakontis al vi pri la vojaĝo al Italujo. Torvald ne travivus, se li ne estus veninta tien --

LINDE. Jes ja, via patro donis al vi la necesan monon --

NORA (ridetas). Jes, tion kredas Torvald kaj ĉiuj aliaj; sed --

LINDE. Sed --?

NORA. Paĉjo donis al ni eĉ ne unu ŝilingon. Estis mi, kiu havigis al ni la monon.

LINDE. Vi? La tutan grandan sumon?

NORA. Mil ducent talerojn. Kvar mil ok cent kronojn. Jen, kion vi diras?

LINDE. Jes sed, Nora, kiel eblis? Ĉu vi gajnis en la loterio?

NORA (malestime). En la loterio? (siblas) Kia lerteco estus tio?

LINDE. Sed de kie vi ricevis ĝin?

NORA (kantetas kaj ridetas mistere). Hm; tra la la la!

LINDE. Ĉar pruntepreni vi ja ne povis.

NORA. Nu? Kial ne?

LINDE. Ne, edzino ne rajtas pruntepreni sen la konsento de la edzo.

NORA (ĵetskuas la kapon). Nu, kiam estas edzino, kiu iom taŭgas pri negocaj aferoj, -- edzino kiu scias iom saĝe aranĝi, kaj --

LINDE. Sed Nora, mi tute ne komprenas --

NORA. Vi tion ankaŭ ne bezonas. Eble mi ne prunteprenis la monon. Eblus havigi ĝin alimaniere. (ĵetas sin malantaŭen en la sofo) Eble mi ricevis ĝin de iu adoranto. Kiam oni estas tiel alloga, kiel mi --

LINDE. Facilanima vi estas.

NORA. Nun vi verŝajne estas senmezure scivolema, Kristine.

LINDE. Jes, aŭdu nun, kara Nora, -- ĉu vi ne agis malprudente?

NORA (eksidas rekte denove). Ĉu estas malprudente savi la vivon de sia edzo?

LINDE. Mi opinias, ke estas malprudente, ke vi sen lia scio --

NORA. Sed ĝuste li devis ja nepre nenion scii! Je Dio, ĉu vi ne komprenas tion? Li eĉ ne devus scii kiom danĝere estas pri si. Ja al mi la kuracistoj venis kaj diris, ke lia vivo estas en danĝero; ke nenio alia povus savi lin krom restado en suda lando. Jen komprenu, ke unue mi devis provi palpe serĉi la vojon. Mi prezentis al li kiel bone estus por mi kiel por aliaj junaj edzinoj vojaĝi eksterlanden; mi ploris kaj petis; mi diris ke li absolute devus pripensi la cirkonstancojn en kiuj mi estas, kaj ke li devus

esti ĝentila kaj cedi al mi; kaj jen mi sugestis ke li povus pruntepreni sumon. Sed tiam li fariĝis preskaŭ kolera, Kristine. Li diris, ke mi estas facilanima, kaj ke estas lia devo kiel edzo ne cedi al tiaj kapricoj kaj ideoj -- kiel li nomis ilin. Nu ja, mi pensis, savota vi estu; kaj tiam mi trovis rimedon --

LINDE. Kaj via edzo, ĉu li ne sciigis de via patro, ke la mono ne venis de li?

NORA. Ne, neniam. Paĉjo mortis ĝuste en tiuj tagoj. Mi intencis informi lin pri la afero kaj peti lin nenion malkaŝi. Sed ĉar li kuŝis malsana --. Bedaŭrinde, ne fariĝis necese.

LINDE. Kaj vi neniam poste konfidis vin al via edzo?

NORA. Ne, pro ĉielo! kiel vi povas pensi tion. Li, kiu estas tiom severa en tiu rilato. Kaj krome -- Torvald, kun sia vira memkonscio -- kiom ĝene kaj humilige estus por li scii, ke li ion ŝuldu al mi. Tio tute misŝovus la rilaton inter ni; nia bela, feliĉa hejmo ne plu restus, kio ĝi nun estas.

LINDE. Kaj vi neniam informos lin?

NORA (pensema, duone ridetante). Jes -- iam eble; -- post multaj jaroj, kiam mi ne plu estos tiel bela kiel nun. Ne ridu! Kompreneble mi pensas: Kiam Torvald ne plu ŝatos min kiel nun; kiam li ne plu trovos plezuron rigardi min danci por li, alivesti min kaj deklami. Tiam estus bone havi ion rezerve -- (interrompas) Pa, pa, pa. Tiu tempo neniam venos. -- Nu, kion vi diras pri mia granda sekreto, Kristine? Ĉu ne ankaŭ mi taŭgas por io? -- Cetere sciu, ke tiu afero multe maltrankviligis min. Ne estis ĉiam facile por mi plenumi la devojn en ĝusta tempo. Sciu ke en la mondo de negoco estas io, kio nomiĝas kvaronjaraj rentoj, kaj io kio nomiĝas partopago; kaj estas ĉiam malfacile trovi monon por ili. Sekve mi devis ŝpari tie kaj tie laŭ ebleco, kiel vi komprenas. El la sumo por mastrumado mi povis nenion flankenmeti, ĉar Torvald devis ja bone vivi. La infanoj ne povis esti malbone vestitaj; kion mi ricevis por ili, mi opiniis, ke mi devas por ili uzi. La dolĉaj, benitaj etuloj!

LINDE. Do vi rezignis pri viaj propraj bezonaĵoj, kompatinda Nora?

NORA. Kompreneble. Mi ja estis la unua por tio. Ĉiam kiam Torvald donis al mi monon por novaj roboj aŭ io simila, mi neniam uzis pli ol la duonon; aĉetis ĉiam la plej simplajn kaj malmultekostajn specojn. Dia beno estis, ke ĉio tiel bone konvenas al mi, tiel ke Torvald nenion observis. Sed estis al mi peze multajn fojojn, Kristine; ĉar tamen estas agrable porti belajn vestojn. Ĉu ne?

LINDE. Ho jes, vere.

NORA. Nu, mi ja ankaŭ havis aliajn enspezfontojn. Lastan vintron mi sukcesis ricevi kopilaboron. Mi ŝlosis la pordon de mia ĉambro, kaj ĉiun vesperon mi sidis skribante ĝis malfrue en la nokto. Aj! Mi estis ofte laca, lacega. Sed tamen estis ege amuze tiel sidi laborante kaj gajni monon. Mi preskaŭ sentis min viro.

LINDE. Sed kiom vi nun tiel povis repagi?

NORA. Nu, tion mi ne povas ĝuste diri. Sciu ke pri tiaj aferoj estas tre malfacile teni klaran superrigardon. Mi scias nur, ke mi pagis ĉiom, kiom mi povis alrasti. Multfoje mi ne vidis eliron. (ridetas) Tiam mi sidis ĉi tie revante, ke maljuna riĉa sinjoro

enamiĝis en mi --

LINDE. Kio? Kiu sinjoro?

NORA. Pa, pa! -- ke jen li mortis, kaj kiam oni malfermis lian testamenton, oni legis tie grandlitere: "Mian monon la afabla sinjorino Nora Helmer tuj ekhavu kontante elpagata."

LINDE. Sed kara Nora, -- kia sinjoro tiu estas?

NORA. Bona Dio! Ĉu vi ne komprenas? La maljuna sinjoro tute ne ekzistis; estis ja nur fantazio, pri kiu mi sidis ĉi tie revante ree kaj ree, kiam mi ne vidis eblecon ekhavi monon. Tamen estas indiferente; tiu maljuna, teda homo restu kie li estas; mi sopiras nek lin nek lian testamenton, ĉar nun mi estas senzorga.

(eksaltas) Ho Dio! Tamen estas ĝuige pri tio pensi, Kristine! Senzorga! Povi esti senzorga, tute senzorga; povi ludi kaj danci kun la infanoj; povi ornami kaj beligi en la domo, ĉion kiel Torvald ŝatas ĝin! Kaj imagu, baldaŭ venos printempo kun vasta, blua ĉielo. Kaj eble ni povos iom vojaĝi. Eble mi revidos la maron. Ho, jes, estas ja vere grandioze vivi kaj esti feliĉa. (sonoras en la antaŭĉambro)

LINDE (ekstaras). Oni sonorigas; eble pli bone ke mi foriru.

NORA. Ne, restu; eble neniu venas; estas por Torvald --

ĈAMBRISTINO (ĉe la pordo). Pardonu, sinjorino, -- estas sinjoro kiu deziras paroli kun la advokato.

NORA. Kun la bankdirektoro, vi volas diri?

ĈAMBRISTINO. Jes, kun la bankdirektoro; sed mi ne sciis -- ĉar la doktoro estas ja tie --

NORA. Kiu sinjoro tiu estas?

Juristo KROGSTAD (ĉe la pordo). Estas mi, sinjorino.

(\_Sinjorino Linde\_ surpriziĝas, ekskuiĝas kaj turnas sin al la fenestro)

NORA (faras paŝon al li maltrankvilega; duonvoĉe). Vi? Kio estas? Pri kio volas vi paroli kun mia edzo?

KROGSTAD. Bankaferoj -- iel. Mi havas etan postenon en la Akciobanko, kaj via edzo estu nun nia estro, oni diras --

NORA. Do estas --

KROGSTAD. Nur sekaj bankaferoj, sinjorino; tute nenio alia.

NORA. Nu, bonvolu eniri la oficejponon. (salutas indiferente, fermante la pordon de la antaŭĉambro; poste ŝi ordigas ion ĉe la forno)

LINDE. Nora, -- kiu estas tiu sinjoro?

NORA. Estas juristo Krogstad.

LINDE. Do vere estas li.

NORA. Vi konas tiun homon?

LINDE. Mi konis lin -- antaŭ pluraj jaroj. Dum periodo li estis prokuristo en nia distrikto.

NORA. Jes, li ja estis.

LINDE. Kiom li ŝanĝiĝis.

NORA. Li travivis malfeliĉan edzecon.

LINDE. Nun li ja estas vidvo.

NORA. Kun multaj infanoj. Jen, fine ekflamas en la forno.

(Ŝi fermas la pordon de la forno, kaj ŝovas la balancan seĝon iom flanken)

LINDE. Li agadas en multspecaj negocoj, oni diras?

NORA. Ĉu? Povas esti; mi tute ne scias --. Sed ni ne pensu pri negocaj aferoj. Estas tiel tede.

(\_Doktoro Rank\_ venas el la oficejo de \_Helmer\_)

RANK (enirante, parolante al \_Helmer\_). Ne, ne; mi ne volas ĝeni; prefere mi eniru al via edzino. (fermas la pordon kaj rimarkas sinjorinon \_Linde\_) Pardonu, eble mi ĝenos ankaŭ tie ĉi.

NORA. Neniel. (prezentas) Doktoro Rank. Sinjorino Linde.

RANK. Nu tiel. Nomo, kiun oni ofte aŭdas en ĉi tiu hejmo. Mi kredas ke mi preterpasis vin, Sinjorino, en la ŝtuparo, kiam mi venis.

LINDE. Jes; mi supreniras malrapide; mi ne bone eltenas.

RANK. Aha, iom kaduka interne?

LINDE. Prefere trostreĉita.

RANK. Nenio alia? Do vi certe venis al la urbo por iom ripozi en la multaj festenoj?

LINDE. Mi venis por trovi laboron.

RANK. Ĉu tio estu efika rimedo kontraŭ troa streĉo?

LINDE. Oni devas vivi, sinjoro doktoro.

RANK. Jes, estas ja ĝenerala opinio, ke estas tiom necese.

NORA. Ho, ne troigu, doktoro Rank, -- ankaŭ vi volas tamen vivi.

RANK. Certe jes, mi volas. Tiel mizera kiel mi estas, mi tamen deziras subiĝi plej longe la torturon. Estas same pri ĉiuj miaj pacientoj. Kaj tiel estas ankaŭ pri la morale infektitaj. Ĝuste nun estas unu tia morale malsanuleja kandidato ĉe Helmer --

LINDE (mallaŭte). Aj!

NORA. Al kiu vi aludas?

RANK. Nu, estas iu juristo Krogstad, homo pri kiu vi nenion scias. Difektiĝis liaj karakterradoj, Sinjorino. Sed eĉ li, kvazaŭ estus gravege, komencis paroli pri la neceso \_vivi.\_

NORA. Eh, pri kio volis li paroli kun Torvald?

RANK. Vere mi ne scias; mi aŭdis nur, ke estas io pri la Akciobanko.

NORA. Mi ne sciis ke Krog --, ke tiu juristo Krogstad havas rilaton kun la Akciobanko.

RANK. Sed jes, li estas iel dungita tie. (al sinjorino \_Linde\_) Mi ne scias, ĉu oni ankaŭ en via distrikto havas tiajn homojn, kiuj anhelante ĉirkaŭkuras por elflari moralan putradon, kaj poste enmetigi la koncernaton por observado en iun avantaĝan oficon. La sanaj devas rezignacie stari ekstere.

LINDE. Estas ja la malsanaj, kiuj pleje bezonas lokon interne.

RANK (ŝultrrotiras). Jen ĝuste tio. Estas tiu konsidero, kiu faras el nia socio malsanulejon.

(\_Nora\_ en siaj propraj pensoj, ekridas kaj frapas la manojn.)

RANK. Kial vi ridas pri tio? Ĉu vi funde scias kio estas la socio?

NORA. Ĉu mi zorgu pri tiu teda socio? Mi ridis pri io tute alia, -- io ege amuza. -- Diru, doktoro Rank, -- ĉiuj kiuj nun estas dungitaj en la Akciobanko, estos nun dependaj de Torvald, ĉu ne?

RANK. Do estas \_tio\_, kion vi trovas tiom ege amuza?

NORA (ridetas kaj kantetas). Lasu al mi pri tio! Lasu al mi pri tio! (paŝas tien kaj reen sur la planko) Jes, vere estas ege amuze pensi, ke ni -- ke Torvald ekhavis tiom da influo sur multajn homojn. (elprenas la saketon el la poŝo) Doktoro Rank, bonvolu etan makaronon.

RANK. Jen, jen; makaronojn. Mi kredis, ke tiuj estas malpermesitaj varoj ĉi tie.

NORA. Jes, sed tiuj estas kelkaj, kiujn Kristine donis al mi.

LINDE. Kio? Mi --?

NORA. Nu, nu, nu; ne timiĝu. Vi ne povis scii, ke Torvald malpermesis tiaĵojn. Sciu ke li timas, ke ili malbeligos miajn dentojn. Sed pa, -- unu fojon --! Ĉu ne, doktoro Rank? Bonvolu! (metas en lian buŝon makaronon) Kaj ankaŭ vi, Kristine. Kaj ankaŭ mi havu unu; nur etetan -- aŭ eble du. (denove marŝas) Jes, nun vere mi estas senmezure feliĉa. Nun restas nur io sola, kion mi ege dezirus fari.

RANK. Nu? Kaj kio estas tio?

NORA. Estas io, kion mi ege ŝatus diri, kun Torvald aŭskultanta.

RANK. Kaj kial vi do ne povas tion diri?

NORA. Ne, mi ne kuraĝas, ĉar estas tro malbela.

LINDE. Malbela?

RANK. Nu ja, sekve ne estas konsilinde. Sed al ni vi ja povas --. Kio do estas tio, kion vi tiom ege ŝatus diri kun Helmer



aŭskultanta?

NORA. Mi treege ŝatus diri: Diablo prenu!

RANK. Vi estas freneza!

LINDE. Sed Dio gardu, Nora --!

RANK. Diru. Jen li estas.

NORA (kaŝas la saketon). Ts, ts, ts.

(\_Helmer\_ kun surtuto sur la brako kaj ĉapelo en la mano venas el sia ĉambro)

NORA (al li renkonte). Nu, kara Torvald, vi liberiĝis de li?

HELMER. Jes, nun li foriris.

NORA. Permesu ke mi prezentu: Estas Kristine, kiu venis al la urbo.

HELMER. Kristine --? Pardonu, sed mi ne scias --

NORA. Sinjorino Linde, kara Torvald, sinjorino Kristine Linde.

HELMER. Ah tiel. Supozeble infanjara amikino de mia edzino?

LINDE. Jes, ni konis unu la alian en pli fruaj tagoj.

NORA. Kaj pensu, ŝi faris la longan vojaĝon por paroli kun vi.

HELMER. Kion tio signifas?

LINDE. Nu, ne ĝuste --

NORA. Kristine estas tiomege lerta pri oficejlaboro, kaj nun ŝi tre deziras veni sub gvidado de sperta estro kaj plivastigi siajn sciojn --

HELMER. Tre prudente, sinjorino.

NORA. Kaj kiam ŝi aŭdis, ke vi fariĝis bankdirektoro -- venis telegramo pri tio -- ŝi laŭeble rapide vojaĝis ĉi tien kaj --. Ĉu ne, Torvald, pro mi vi povas ion fari por Kristine? Ĉu?

HELMER. Ja, vere tio ne estas neebla. Sinjorino estas supozeble vidvino?

LINDE. Jes.

HELMER. Kaj praktikis oficejlaboron?

LINDE. Jes konsiderinde.

HELMER. Nu, do estas verŝajne ke mi povas vin enoficigi --

NORA (manklakas). Jen, vidu; vidu!

HELMER. Vi venis en bonŝanca momento, sinjorino --

LINDE. Ho, kiel mi danku vin --?

HELMER. Ne dankinde. (surprenas la surtuton) Sed hodiaŭ vi devas

pardoni min --

RANK. Atendu; mi vin akompanos. (serĉas sian pelton en la antaŭĉambro kaj varmigas ĝin apud la forno)

NORA. Ne forestu longe, kara Torvald.

HELMER. Eble unu horon, ne pli.

NORA. Ĉu ankaŭ vi foriros, Kristine?

LINDE (surmetas la supervestojn). Jes, nun mi devas eliri por serĉi ĉambron.

HELMER. Do eble mi akompanu vin en la strato?

NORA (helpas ŝin). Bedaŭrinde ke ni loĝas tiel malvaste; sed neblas --

LINDE. Ho, pri kio vi pensas! Adiaŭ, kara Nora, kaj multajn dankojn.

NORA. Ĝis revido. Kaj en la vespero vi revenos, kompreneble. Kaj ankaŭ vi, doktoro Rank. Nu? Se vi bonfartos? Ja certe vi bonfartos; involvu vin sufiĉe.

(Foriro tra la antaŭĉambro, dum ili interparoladas. Oni aŭdas voĉojn de \_infanoj\_ ekstere en la ŝtuparo.)

NORA. Jen ili! Jen ili estas!

(Ŝi alkuras por malfermi. La vartistino \_Anne-Marie\_ venas kun la infanoj)

NORA. Envenu; envenu! (klinas sin kaj kisas ilin) Ho, vi dolĉaj, benitaj --! Rigardu ilin, Kristine! Ĉu ili ne estas amindaj!

RANK. Ne babiladu ĉi tie en la trablovo!

HELMER. Venu, sinjorino Linde; nun estos elteneble nur por patrinoj.

(\_Doktoro Rank, Helmer\_ kaj \_sinjorino Linde\_ malsupreniras la ŝtuparon; la \_vartistino\_ eniras la ĉambron kun la infanoj. Ankaŭ \_Nora\_, fermante la pordon de la antaŭĉambro.)

NORA. Kiel viglaj kaj sanaspektaj vi estas. Kaj jen kiel ruĝaj viaj vangoj! Kiel pomoj kaj rozoj. (La infanoj parolas vigle samtempe kun ŝi) Kaj vi tre amuziĝis? Bonege. Ĉu do; vi tiris Emmy kaj Bob sur la luĝo? Kaj samtempe! Jen kia forta knabo vi estas, Ivar. Ho, lasu min teni ŝin iomete, Anne-Marie. Mia dolĉa eta pupinfano! (prenas la plej malgrandan de la vartistino kaj dancas kun ŝi) Jes, jes, panjo dancos ankaŭ kun Bob. Kion? Vi ĵetis neĝbulojn? Ho, tie mi dezirus partopreni! Ne ne, Anne-Marie. Mi mem senvestigos ilin. Lasu min fari; estas tiom amuze. Eniru dume; vi aspektas frostotreme. Varma kafo por vi staras sur la forno.

(La \_vartistino\_ eniras la maldekstran ĉambron. \_Nora\_ deprenas la supervestojn de la infanoj kaj ĵetas ilin tien kaj tien, lasante ilin rakontadi superkriante unu la alian.)

NORA. Oj? Granda hundo, kiu kuris post vin? Sed ĝi ne mordis? Ne, hundoj ne mordas etajn, dolĉajn pupinfanojn. Ne enrigardu la paketojn, Ivar! Kio estas? Ja, tion vi volus scii. Ho ne! Ho ne! Estas io terura. Nu? Ĉu ni ludu? Kion ni ludu? Kaŝludon? Jes, ni

kaŝludu. Bob sin kaŝu la unua. Mi? Do mi kaŝu min la unua.

(Ili ludas dum rido kaj ĝojkrioj en la sidĉambro kaj la apuda ĉambro dekstre. Fine \_Nora\_ kaŝas sin sub la tablo; la infanoj enkuras, serĉas, sed ne trovas ŝin, aŭdas ŝian sufokitan ridon, kuras al la tablo, levas la tukon, ekvidas ŝin. Bruega ĝojo. Ŝi elrampas kaj ŝajnigas timigi ilin. Novaj ĝojkrioj. Dume iu frapis la enirpordon; neniu tion rimarkis. Iu malfermas la pordon duone, kaj \_juristo Krogstad\_ aperas; li iom atendas; la ludo daŭras)

KROGSTAD. Pardonu, sinjorino Helmer --

NORA (sufokata ekkrio; turnas sin kaj eksaltas duone supren). Ho, kion vi volas?

KROGSTAD. Pardonu; la ekstera pordo estis nur duone fermita; iu estas forgesinta fermi ĝin --

NORA (ekstaras). Mia edzo ne estas hejme, sinjoro Krogstad.

KROGSTAD. Tion mi scias.

NORA. Nu -- kion vi do volas?

KROGSTAD. Paroli kelkajn vortojn kun vi.

NORA. Kun --? (al la infanoj, mallaŭte) Eniru al Anne-Marie. Kion? Ne, la fremda viro ne volas ion malbonan fari al panjo. Ni denove ludos post kiam li foriris. (Ŝi kondukas la infanojn en la maldekstran ĉambron kaj fermas la pordon malantaŭ ili)

NORA (maltrankvila, atentema). Vi volas paroli kun mi?

KROGSTAD. Jes, mi volas.

NORA. Hodiaŭ --? Sed ankoraŭ ne estas la unua en la monato.

KROGSTAD. Ne, sed estas Julvespero. Dependas de vi kian Julplezuron vi havos.

NORA. Kion vi volas? Mi tute ne povas hodiaŭ --

KROGSTAD. Pri tio ni ĝis plue ne parolu. Estas io alia. Mi esperas, ke vi havas liberan momenton?

NORA. Jes, jes certe mi havas, kvankam --

KROGSTAD. Bone. Mi sidis en la restoracio de Olsen kaj vidis vian edzon malsupreniri la straton --

NORA. Nu ja --

KROGSTAD. -- kun virino.

NORA. Kaj kio pri tio?

KROGSTAD. Pardonu, ke mi demandas: Ĉu ne tiu virino estas sinjorino Linde?

NORA. Jes.

KROGSTAD. Ĵus veninta urben?

NORA. Jes, hodiaŭ.

KROGSTAD. Ŝi estas ja via bona amikino?

NORA. Jes, ŝi estas. Sed mi ne komprenas --

KROGSTAD. Ankaŭ mi iam konis ŝin.

NORA. Mi scias.

KROGSTAD. Ehe? Vi scias pri tiu afero. Tion mi pensis. Do, permesu ke mi vin demandu rekte: Ĉu sinjorino Linde ricevos postenon en la Akciobanko?

NORA. Kial vi povas permesi al vi pridemandi \_min\_, sinjoro Krogstad, vi, kiu estas unu el la subuloj de mia edzo? Sed ĉar vi demandas, mi sciigu vin: Jes, sinjorino Linde estos dungata. Kaj estas mi, kiu pledis por ŝi, sinjoro Krogstad. Do nun vi scias.

KROGSTAD. Mi do kalkulis ĝuste.

NORA (iom paŝadas sur la planko). Hm, oni havas ja iometan influon, mi supozas. Kvankam oni estas virino, tio ne signifas, ke -- Kiam oni staras en subula rilato, sinjoro Krogstad, oni devus vere esti singarda kaj ne ofendi iun, kiu -- eh --

KROGSTAD. -- kiu havas influon?

NORA. Jes ĝuste.

KROGSTAD (ŝanĝas tonon). Sinjorino Helmer, bonvolu uzi vian influon por mi.

NORA. Kion do? Al kio vi celas?

KROGSTAD. Bonvolu prizorgi, ke mi gardu mian subalternan postenon en la banko.

NORA. Kion tio signifas? Kiu intencas preni de vi vian postenon?

KROGSTAD. Ho, vi ne bezonas ludi nescion antaŭ mi. Mi bone komprenas, ke ne estos agrable por via amikino riski renkonti min; kaj nun mi ankaŭ komprenas, kiun mi danku por la decido forpeli min.

NORA. Sed mi certigas --

KROGSTAD. Nu jes, jes, rekte dirite: estas ankoraŭ tempo, kaj mi konsilas al vi, ke vi uzu vian influon por tion malhelpi.

NORA. Sed, sinjoro Krogstad, mi tute neniun influon havas.

KROGSTAD. Vere ne? Ŝajnas al mi, ke vi mem ĵus diris --

NORA. Kompreneble tio ne signifas tion --. Mi! Kiel vi kredas, ke mi havus tian influon sur mia edzo?

KROGSTAD. He, mi konas vian edzon de la studentotagoj. Mi pensas ke la sinjoro bankdirektoro ne estas pli firma ol aliaj edzoj.

NORA. Se vi parolas malestime pri mia edzo, mi montros al vi la pordon.

KROGSTAD. Sinjorino estas kuraĝa.

NORA. Mi ne plu timas vin. Post novjartago mi baldaŭ liberiĝos

el la afero.

KROGSTAD (pli sinrega). Aŭskultu nun, Sinjorino. Se fariĝos necese, mi batalos kvazaŭ por la vivo, por gardi tiun mian etan oficon en la banko.

NORA. Jes, aspektas ja tiel.

KROGSTAD. Ne estas nur por la enspezo; tiu eĉ plej malmulte gravas. Sed estas io alia --. Do, mi klarigu! Estas jena afero: Vi kompreneble scias same bone kiel ĉiuj aliaj, ke mi antaŭ kelkaj jaroj fariĝis kulpa pri ago malprudenta.

NORA. Mi kredas, ke mi ion tian aŭdis.

KROGSTAD. Ne fariĝis proceso; tamen tuj ĉiuj vojoj bariĝis por mi. Sekve mi komencis tiajn negocojn, pri kiuj vi scias. Al io mi devis kroĉi min; kaj mi rajtas diri, ke mi ne estas el la plej malbonaj. Sed nun mi devas liberigi min el tio. Miaj filoj kreskas; pro ili mi devas kiel eble regajni civitanan estimon. Tiu ofico en la banko estas kvazaŭ la unua ŝtupo por mi. Kaj nun via edzo volas piedfrapi min for de la ŝtuparo, tiel ke mi ree staru en la koto.

NORA. Sed pro Dio, sinjoro Krogstad, mi tute ne kapablas helpi vin.

KROGSTAD. Estas tial, ke vi ne volas; sed mi havas rimedojn por vin devigi.

NORA. Vi ne intencas diri al mia edzo, ĉu? ke mi ŝuldas monon al vi?

KROGSTAD. Hm, se mi tamen al li dirus?

NORA. Estus de vi fia ago. (plorsingulte) Tiun sekreton, kiu estas mia feliĉo kaj fiero, tiun li eksciis en tia abomena kaj plumpa maniero, -- eksciis ĝin de \_vi\_. Vi ĵetus min en terurajn malagrablojn --

KROGSTAD. Nur malagrablojn?

NORA (impete). Sed nur faru; estos plej fatale por vi mem; ĉar tiam mia edzo vere vidos, kia malbona homo vi estas, kaj tiam vi tute ne konservos vian oficon.

KROGSTAD. Mi demandis, ĉu estas nur familiaj malagrabloj, kiujn vi timas?

NORA. Se mia edzo ekscios, kompreneble li tuj pagos la reston; kaj poste ni havos neniun rilaton al vi.

KROGSTAD (paŝon pli proksimen). Aŭskultu, sinjorino Helmer; -- aŭ via memorkapablo estas iom malforta, aŭ vi ne bone komprenas negocajn aferojn. Mi vidas, ke mi devas orientigi vin iom pli bone pri la afero.

NORA. Kiel do?

KROGSTAD. Kiam via edzo estis malsana, vi venis al mi por pruntepreni mil ducent talerojn.

NORA. Mi sciis pri neniu alia.

KROGSTAD. Mi promesis havigi al vi la sumon --

NORA. Vi ja faris.

KROGSTAD. Mi promesis havigi al vi la sumon sub certaj kondiĉoj. Vi estis tiam tiel okupata pri la malsano de via edzo, kaj tiom febre serĉis vojaĝmonon, ke vi, mi kredas, ne klare pensis pri akcesoraj cirkonstancoj. Tial ne estas malutile vekigi vian memoron. Do; mi promesis havigi al vi la monon kontraŭ ŝuldatesto, kiun mi redaktis.

NORA. Jes, kaj kiun mi subskribis.

KROGSTAD. Bone. Sed sube mi skribis kelkajn liniojn, laŭ kiuj via patro garantiis por la ŝuldo. Tiujn liniojn via patro devus subskribi.

NORA. Devus --? Li ja subskribis.

KROGSTAD. Mi metis la daton en blanko; tio signifis, ke via patro skribu mem la daton, kiam li subskribis la paperon. Ĉu sinjorino memoras tion?

NORA. Jes, mi opinias --

KROGSTAD. Mi transdonis al vi la ŝuldateston, por ke vi sendu ĝin perpoŝte al via patro. Vi memoras, ĉu ne?

NORA. Jes.

KROGSTAD. Kaj tion vi kompreneble tuj faris; ĉar jam post kvin aŭ ses tagoj vi transdonis al mi la ateston kun la subskribo de via patro. Kaj mi elpagis al vi la sumon.

NORA. Nu ja; ĉu mi ne repagis la partojn regule?

KROGSTAD. Jes, sufiĉe, jes. Sed por reveni al tio, kion ni priparolis, -- estis ja zorgoplena tempo por vi tiam, sinjorino?

NORA. Jes, vere estis.

KROGSTAD. Via patro kuŝis tre malsana, mi kredas.

NORA. Estis ĉe la fino.

KROGSTAD. Mortis baldaŭ poste.

NORA. Jes.

KROGSTAD. Diru al mi, sinjorino Helmer, ĉu vi eble memoras la tagon kiam via patro mortis? Kiun tagon en la monato, mi volas diri.

NORA. Paĉjo mortis la 29-an de Septembro.

KROGSTAD. Tute ĝuste; pri tio mi havigis informon. Tial estas strangaĵo, (elprenas paperon) kiun mi ne povas klarigi al mi.

NORA. Kiu strangaĵo? Mi ne scias --

KROGSTAD. Estas jena strangaĵo, ke via patro subskribis tiun ŝuldateston tri tagojn post sia morto.

NORA. Kiel? Mi ne komprenas --

KROGSTAD. Via patro mortis la 29-an de Septembro. Sed rigardu. Ĉi tie via patro metis daton de sia subskribo la 2-an de Oktobro. Ĉu ne strange, sinjorino?

NORA. (silentas)

KROGSTAD. Vi povas tion klarigi, ĉu?

NORA. (daŭre silentas)

KROGSTAD. Rimarkinde estas ankaŭ, ke la vortoj 2-an de Oktobro kaj la jaro ne estas skribitaj per la manskribo de via patro, sed per manskribo kiun mi opinias konata. Nu, tio ja estas klarigebla; via patro eble forgesis datumi sian subskribon, kaj poste iu alia hazarde faris tion antaŭ ol oni sciis pri la morto. Ne estas trompo en tio. Estas la subskribo de la nomo kiu gravas. Kaj \_tiu\_ ja estas aŭtentika, sinjorino Helmer? Estas ja vere via patro, kiu mem skribis sian nomon tie? Ĉu ne?

NORA (post mallonga paŭzo, ĵetskuas la kapon kaj rigardas lin spite). Ne, tiel ne estas. Estas \_mi\_, kiu skribis la nomon de paĉjo.

KROGSTAD. Aŭdu, sinjorino, -- ĉu vi scias, ke tio ja estas danĝera konfeso?

NORA. Kial? Vi baldaŭ ricevos vian monon.

KROGSTAD. Permesu al mi fari demandon: Kial vi ne sendis la paperon al via patro?

NORA. Ne eblis. Paĉjo ja kuŝis malsana. Se mi petus lian subskribon, mi devus ankaŭ diri al li por kio ni uzus la monon. Sed mi ne povis diri al li, kiu tiom malsanis, ke la vivo de mia edzo estas en danĝero. Estis ja neeble.

KROGSTAD. Do estus pli bone por vi, se vi tiam rezignus pri tiu vojaĝo eksterlanden.

NORA. Ne; estis ja neeble. Tiu vojaĝo ja savus la vivon de mia edzo. Mi ne povis rezigni pri ĝi.

KROGSTAD. Sed vi ne pensis, ke estas trompo kontraŭ mi --?

NORA. Tion mi tute ne povis konsideri. Mi neniel ĝenis min pri vi. Mi ne toleris vin pro tiuj senkoraj malfacilaĵoj, kiujn vi faris, kvankam vi sciis kiom danĝera estis la sanstato de mia edzo.

KROGSTAD. Sinjorino Helmer, evidente vi ne havas iun klaran ideon, pri la ago je kiu vi kulpiĝis. Sed mi povas ekspliki al vi, ke tio, kion mi iam faris, ne estis pli grava nek pli malbona; kaj tio detruis mian tutan civitanan staton.

NORA. Vi? Vi volas kredigi al mi, ke vi estus farinta ion tiom kuraĝan por savi la vivon de via edzino?

KROGSTAD. La leĝoj ne demandas pri motivoj.

NORA. Do estas ja tre malbonaj leĝoj.

KROGSTAD. Ĉu malbonaj aŭ ne, -- se mi prezentos tiun paperon en la tribunalo, vi estos kondamnata laŭ la leĝoj.

NORA. Mi tute ne kredas. Filino ne rajtus protekti kontraŭ timo kaj zorgo sian maljunan morte malsanan patron? Edzino ne rajtus savi la vivon de sia edzo? Mi ne scias profunde la leĝojn; tamen mi estas certa, ke ie ili decidus ke tio estas permesita. Kaj pri tio vi nenion scias, vi, kiu estas juristo? Vi verŝajne estas

malbona juristo, sinjoro Krogstad.

KROGSTAD. Mi eble estas. Sed negocojn tiajn, kiajn ni havas kune, -- tiujn vi certe kredas, ke mi komprenas? Bone. Faru kiel al vi plaĉas. Sed tion mi diras al vi: se mi duan fojon estos forpelita, vi min akompanu.

(Li salutas kaj eliras tra la antaŭĉambro)

NORA (dum tempo pensante; ĵetskuas la kapon). Ho jen! -- Voli min timigi! Tiel naiva mi ne estas. (komencas ordigi la vestojn de la infanoj; baldaŭ ĉesas) Sed --? -- -- Ne, sed estas ja neeble! Mi agis el amo!

INFANOJ (ĉe la pordo maldekstre). Panjo, la fremda viro eliris tra la pordego.

NORA. Jes, jes, mi scias. Sed ne parolu al iu ajn pri tiu fremda viro. Ĉu vi aŭdas? Eĉ ne al paĉjo!

INFANOJ. Ne, panjo; sed nun ni ankoraŭ ludu?

NORA. Ne, ne; ne nun.

INFANOJ. Ho, tamen panjo, vi ja promesis.

NORA. Jes, sed mi ne povas nun. Eniru. Mi havas tiom farendan. Eniru, eniru, karaj dolĉaj infanoj.

(Ŝi ŝovas ilin milde en la apudan ĉambron, kaj fermas la pordon post ili.)

NORA (eksidas sur la sofon, prenas brodlaboron, kaj faras kelkajn kudrerojn, sed baldaŭ haltas). Ne! (forĵetas la brodaĵon, ekstaras, iras al la antaŭĉambra pordo kaj vokas:) Helene! enportu al mi la Jularbon. (iras al la maldekstra tablo kaj malfermas la tirkeston; denove haltas) Ne, sed estas ja tute neeble!

ĈAMBRISTINO (kun la Jularbo). Kien mi metu ĝin, sinjorino?

NORA. Tien; meze sur la plankon.

ĈAMBRISTINO. Ĉu mi alportu ion kroman?

NORA. Ne, dankon; mi havas, kion mi bezonas.

(La ĉambristino, kiu jam demetis la arbon, eliras.)

NORA (dum ŝi ornamas la arbon). Tie estu kandeloj -- kaj tie floroj. -- La abomena homo! Babilaĉo! Estas nenio ĝena. La Jularbo estu belega. Mi faros ĉion, kion vi ŝatos, Torvald; -- mi kantos por vi, dancos por vi --

(Helmer, kun paketo da dokumentoj sub la brako, eniras el ekstere)

NORA. Ah, -- vi jam revenas?

HELMER. Jes. Ĉu iu vizitis?

NORA. Ĉi tie? Ne.

HELMER. Strange. Mi vidis Krogstad eliri tra la pordego.

NORA. Ĉu? Ho jes, vere, Krogstad envenis momenton.



HELMER. Nora, mi povas vidi laŭ via vizaĝo, ke li vizitis vin, kaj petis, ke vi parolu favore por li.

NORA. Jes.

HELMER. Kaj tion vi farus kvazaŭ laŭ propra instigo, ĉu? Kaj vi devus kaŝi por mi, ke li estis ĉi tie. Ankaŭ pri tio li petis?

NORA. Jes, Torvald; sed --

HELMER. Nora, Nora, kaj en tio vi povis partopreni? Interparoli kun tia homo, kaj doni al li ian promeson! Kaj aldone diri al mi mensogon!

NORA. Mensogon --?

HELMER. Vi diris, ke neniu estis ĉi tie, -- ĉu ne? (minacas per la fingro) Tion neniam plu mia eta kantbirdo faru. Kantbirdo devas kanti per pura beko; neniam falsajn tonojn. (prenas ŝin ĉirkaŭ la talion) Ĉu ne tiel estu? Jes ja, mi ja sciis. (lasas ŝin) Kaj nun ne pli pri tio. (sidigas sin apud la fornon) Ah, kiel hejmece estas. (foliumas siajn dokumentojn)

NORA (okupata pri la Jularbo; post mallonge). Torvald!

HELMER. Jes.

NORA. Mi ege antaŭĝuas la kostumobalon ĉe geamikoj Stenborg postmorgaŭ.

HELMER. Kaj mi estas senmezure scivolema vidi per kio vi surprizos min.

NORA. Ho, tiu stulta kaprico.

HELMER. Nu?

NORA. Mi ne povas ion taŭgan elpensi; ĉio aspektas tiel stulte, tiel sensignife.

HELMER. Ĉu Nonjo atingis \_tiun\_ rekonon?

NORA (malantaŭ lia seĝo, la brakojn sur la seĝodorso). Ĉu vi estas tre okupata, Torvald?

HELMER. Nu --

NORA. Kiaj paperoj estas tiuj?

HELMER. Bankaferoj.

NORA. Jam nun?

HELMER. Mi igis la ekŝiantan estraron rajtigi min fari la necesajn ŝanĝojn en la personaro kaj en la dispozicia plano. Por tio mi devas uzi la Julsemajnon. Mi deziras ĉion ordigi ĝis novjaro.

NORA. Do estas tial ke tiu povra Krogstad --

HELMER. Hm.

NORA (daŭre apogata al la seĝodorso; malrapide taŭzante liajn nukharojn). Se vi ne estus tiom okupata, mi estus petinta vin pri ege granda servo, Torvald.

HELMER. Diru. Kio estus?

NORA. Estas ja neniŭ, kiu havas tiel delikatan guston kiel vi. Mi ege dezirus aspekti bele en la kostumobalo. Torvald, eble vi povus helpi min kaj decidi, kion mi prezentu, kaj kia estu mia kostumo?

HELMER. Jen, jen; la obstinulineto serĉas savonton?

NORA. Jes, Torvald, mi neniel progresas sen via helpo.

HELMER. Bone, bone; mi pensos pri la afero; ni trovos solvon.

NORA. Ho, kiom bona vi estas. (iras al la Jularbo; paŭzo) Kiel bele la ruĝaj floroj aspektas. -- Sed diru, ĉu vere estas tiom fia, la ago pri kiu Krogstad kulpiĝis?

HELMER. Skribis falsajn nomojn. Vi ne distingas, kion tio signifas?

NORA. Eble li tion faris pro mizero?

HELMER. Eble, aŭ, kiel multaj faras, senprudente. Mi ne estas tiel senkora, ke mi senplue kondamnu homon pro tia unusola ago.

NORA. Ne, vere ne, Torvald?

HELMER. Multaj povas morale rehonorigi sin, se ili malkaŝe konfesas sian kulpon kaj akceptas sian punon.

NORA. Punon --?

HELMER. Sed tiun vojon Krogstad ne iris; li trahelpis sin per ruza artifiko; kaj estas tio, kio morale detruis lin.

NORA. Vi kredas, ke fariĝus --?

HELMER. Pensu nur, kiel tia kulpokonscia homo devas mensogi kaj hipokriti kaj simuli al ĉiuj flankoj, kaj montri maskon antaŭ siaj plej proksimaj, eĉ antaŭ sia propra edzino kaj siaj propraj infanoj. Kaj tio koncerne la infanojn, tio estas la plej terura, Nora.

NORA. Kial?

HELMER. Ĉar tia haladza etoso de mensogo enkondukas infekton kaj malsanojn en la vivon de tuta hejmo. Ĉiuj enspiroj de la infanoj en tia hejmo estas plenaj de ĝermoj por io fia.

NORA (pli proksime malantaŭ li). Kaj pri tio vi estas tute certa?

HELMER. Kara mia, tion mi sufiĉe ofte spertis kiel advokato. Preskaŭ ĉiuj frue koruptitaj homoj havis mensogantajn patrinojn.

NORA. Kial ĝuste -- patrinojn?

HELMER. Devenas plej ofte de la patrinoj; sed patroj kompreneble influas en la sama direkto; tion tre bone scias ĉiu juristo. Kaj tamen tiu Krogstad dum jaroj en sia hejmo venenigis siajn proprajn infanojn en mensogo kaj simulo; tial mi nomas lin morale koruptita. (etendas al ŝi la manojn) Tial, mia dolĉa Nonja promesu al mi ne pledi por li. Vian manon pri tio! Nu do, kio estas? Donu al mi la

manon! Jen bone. Do decidite. Mi certigas al vi, ke ne eblus labori kune kun li; mi fakte sentas korpan malsanon en la ĉeesto de tiaj homoj.

NORA (tiras al si la manon, kaj iras al la alia flanko de la Jularbo). Kiom varme estas. Kaj mi, kiu havas tiom por fari.

HELMER (ekstaras kaj kolektas siajn dokumentojn). Nu, mi devas ja provi tralegi iom de tiuj dokumentoj antaŭ ol iri al la tablo. Ankaŭ vian kostumon mi devas pripensi. Kaj krome mi havas preta ion por pendigi en orpapero sur la Jularbo. (metas la manon sur ŝian kapon) Ho vi, mia benita kantbirdeto. (Li iras en sian ĉambron kaj fermas la pordon post si.)

NORA (mallaŭte post silento). Ho ne! ne estas tiel. Estas neeble. Devas esti neeble.

VARTISTINO (ĉe la pordo maldekstre). La etuloj tiel bele petas, ke ili povu enveni al panjo.

NORA. Ne, ne, ne; Ne enlasu ilin al mi! Restu ĉe ili vi, Anne-Marie.

VARTISTINO. Jes, jes, sinjorino. (fermas la pordon)

NORA (pala pro teruro). Korupti miajn infanetojn --! Venenigi la hejmon? (eta paŭzo; ŝi rektigas la nukon) Ne estas vero. Je eterno tio ne estas vero!

## DUA AKTO

(La sama ĉambro. Fone en la angulo apud la piano staras la Jularbo, senornama, taŭzita, kaj kun duone brulintaj kandeloj. Sur la sofo kuŝas la supervestoj de Nora.)

(\_Nora\_, sola en la ĉambro, paŝadas maltrankvila tien kaj reen; fine ŝi haltas ĉe la sofo kaj prenas sian mantelon.)

NORA (ree faligas la mantelon). Iu venas! (kontraŭ la pordon; aŭskultas) Ne, -- neniu. Kompreneble -- neniu venas hodiaŭ, la unuan Jultagon; -- kaj ankaŭ ne morgaŭ. -- Sed eble -- (malfermas la pordon kaj rigardas eksteren) Ne; nenio en la leterskatolo; tute malplena. (antaŭen sur la planko) Ho, stultaĵo! Kompreneble li ne efektive tion faros. Tiaĵo ne povas okazi. Neeblas! -- Mi havas ja tri infanetojn.

(La vartistino, kun granda kartona skatolo, venas de la maldekstra ĉambro)

VARTISTINO. Jen, fine mi trovis la skatolon kun la vestaĵoj por la maskerado.

NORA. Dankon; metu ĝin sur la tablon.

VARTISTINO (tion faras). Sed ili estas en granda malordo.

NORA. Ho, se mi povus ilin disŝiri en cent mil pecojn!

VARTISTINO. Dio gardu; ili estas facile ripareblaj; nur iom da pacienco.

NORA. Jes, mi do iros peti sinjorinon Linde helpi min.

VARTISTINO. Nun -- denove eliri? En tiu aĉa vetero? Sinjorino Nora kaptos malvarmumon, -- malsaniĝos.

NORA. Ho, la plej malbona ne estus tio. -- Kiel fartas la infanoj?

VARTISTINO. La karaj etuloj ludas per la Juldonacoj, sed --.

NORA. Ĉu ili ofte demandas pri mi?

VARTISTINO. Ili ja alkiutimiĝis havi panjon ĉe si.

NORA. Jes, sed Anne-Marie, de nun mi ne plu \_povas\_ esti kune kun ili tiom kiom antaŭe.

VARTISTINO. Nu, infanetoj al ĉio kutimiĝas.

NORA. Vi kredas? Vi vere kredas, ke ili forgesus sian panjon, se ŝi tute malaperus?

VARTISTINO. Dio gardu; -- tute malaperus!

NORA. Aŭskultu, diru, Anne-Marie, -- mi ofte pensis pri tio, -- kiel via koro povis elteni forsendi vian infanon al fremduloj?

VARTISTINO. Sed tion mi ja devis fari por nutri etan Nora.

NORA. Jes, sed ke vi tion \_volis\_?

VARTISTINO. Kun ŝanco por tiel bona okupo? Malriĉa knabino trafita de misfortuno devas esti kontenta. Ĉar la malbona ulo faris ja nenion por mi.

NORA. Sed via filino vin certe forgesis.

VARTISTINO. Ho ne, ŝi ne forgesis. Ŝi skribis al mi je sia konfirmacio kaj ankaŭ kiam ŝi edziniĝis.

NORA (ĉirkaŭbrakas ŝian kolon). Vi maljuna Anne-Marie, vi estis bona patrino por mi dum mi estis infano.

VARTISTINO. Kompatinda Nonjo havis ja neniun alian patrinon.

NORA. Kaj se la etuloj neniun alian havus, mi certe scias, ke vi volus --. Bla, bla, bla. (malfermas la skatolon) Eniru al ili. Nun mi devas -- -- Morgaŭ vi vidos kiel ĉarma mi fariĝos.

VARTISTINO. Jes certe, neniun en la tuta balo estos tiel ĉarma kiel sinjorino Nora. (eniras la maldekstran ĉambron)

NORA (komencas elpreni el la skatolo, sed baldaŭ forĵetas ĉion). Ho, se mi kuraĝus eliri. Se nur neniun venus. Se nur ne dume okazus io hejme. Stulta babilaĵo; neniun venus. Nur ne pensi. Brosi la mufon. Delikataj gantoj, delikataj gantoj. For el la pensoj! For, for! Unu, du, tri, kvar, kvin, ses -- (krias) Jen, tie ili venas -- (al la pordo, sed haltas sendecide)

(\_Sinjorino Linde\_ eniras el la antaŭĉambro, kie ŝi demetis siajn supervestojn)

NORA. Ho, ĉu estas vi, Kristine. Neniun alia tie ekstere? -- Kiom bone ke vi venis.

LINDE. Mi aŭdis, ke vi venis demandi min.

NORA. Jes, mi ĵus preterpasis. Estas io pri kio vi nepre devas helpi min. Ni sidiĝu ĉi tie sur la sofo. Jen. Okazos maskeradobalo morgaŭ vespere supre ĉe la geedzoj konsulo Stenborg, kaj nun Torvald volas, ke mi estu fiŝista knabino el Napolo, kaj ke mi dancu Tarantelon, ĉar ĝin mi lernis en Kapreo.

LINDE. Jen, jen! Vi faros veran prezentadon?

NORA. Jes, Torvald diras, ke mi devas. Jen, la kostumo; Torvald tie en Napolo kudrigis ĝin por mi; sed nun ĉio estas tiel disŝirita, ke mi tute ne scias --

LINDE. Nu, tion ni baldaŭ ordigos; estas ja nur la garnaĵo, kiu iom malfiksiĝis. Kudrilon kaj fadenon? Jen ni ja havas kion ni bezonas.

NORA. Ho, kiom afabla vi estas.

LINDE (kudras). Do vi maskovestos vin morgaŭ, Nora? Sciu, -- tiam mi venos momenton por vidi vin ornamita. Sed mi ja tute forgesis danki vin pro la agrabla vespero hieraŭ.

NORA (levas sin kaj faras kelkajn paŝojn). Nu, ŝajnis al mi, ke hieraŭ ne estis tiel agrable kiel kutime. -- Vi estus devinta veni iom pli frue al la urbo, Kristine. -- Jes ja, Torvald vere komprenas fari la domon perfekta kaj senmakula.

LINDE. Vi ne malpli, mi opinias; klare montriĝas, ke vi estas la filino de via patro. Sed nun diru al mi, ĉu doktoro Rank ĉiam estas tiel deprimata kiel hieraŭ?

NORA. Ne, hieraŭ tio estis tre rimarkebla. Cetere li suferas de tre danĝera malsano. Tuberkulozo en la spino. Kompatindulo! Mi diru al vi konfide; lia patro estis abomeninda homo, kiu tenis amdonantinojn kaj aliajn tiajn; kaj tial, vi komprenas, la filo fariĝis malsaneca de infanaĝo.

LINDE (faligas la kudraĵon). Sed karega Nora, de kie vi havas tiajn informojn?

NORA (paŝante). Pa, kiam oni havas tri infanojn, oni foje ricevas vizitojn de -- de sinjorinoj, kiuj estas kvazaŭaj kuracistoj; kaj ili ja rakontas ion kaj tion.

LINDE (denove kudras; mallonga silento). Ĉu doktoro Rank vizitas vin ĉiun tagon?

NORA. Ĉiun laŭvican tagon. Li estas ja ekde la juneco la plej bona amiko de Torvald, kaj ankaŭ mia bona amiko. Doktoro Rank kvazaŭ apartenas al la domo.

LINDE. Sed diru al mi: Ĉu tiu sinjoro estas tute sincera? Mi sugestas, ĉu li ne ŝatas diri al homoj agrablaĵojn?

NORA. Ne, kontraŭe! Kial vi ekhavis tiun impreson?

LINDE. Kiam vi hieraŭ prezentis min al li, li asertis, ke en tiu ĉi domo li ofte aŭdis mian nomon; sed poste mi rimarkis, ke via edzo tute ne sciis, kiu mi vere estas. Kiel povis do doktoro Rank --?

NORA. Jes, tute ĝuste, Kristine. Torvald ja tiom kore amas min; kaj tial li tute sola volas posedi min, kiel li diras. En la unua tempo li preskaŭ fariĝis ĵaluza, se mi nur menciis iujn el la karaj homoj tie hejme. Do mi ne plu faris. Sed kun doktoro Rank mi ofte parolas pri tiaĵoj; ĉar komprenu, li tre volonte aŭskultas.

LINDE. Nun vi aŭskultu, Nora; en multaj rilatoj vi ankoraŭ estas kiel infano; mi estas ja konsiderinde pli aĝa ol vi, kaj havas iom pli da sperto. Mi volas diri ion al vi: Vi devas eltiri vin el tio ĉi kun doktoro Rank.

NORA. El kio mi devus eltiri min?

LINDE. El io kaj tio, mi opinias. Hieraŭ vi parolis pri iu riĉa adoranto, kiu havigus al vi monon --

NORA. Jes, iu kiu ne ekzistas -- bedaŭrinde. Sed kio plue?

LINDE. Ĉu doktoro Rank estas riĉa?

NORA. Jes, li estas.

LINDE. Kaj havas neniun prizorgendan?

NORA. Ne, neniun; sed --?

LINDE. Kaj li vizitas vin ĉi-hejme ĉiun tagon?

NORA. Jes, kiel vi aŭdas.

LINDE. Sed kiel povas tiu bonkondata sinjoro tiel persiste altrudi sin?

NORA. Mi vin tute ne komprenas.

LINDE. Ne ŝajnu, Nora. Ĉu vi opinias, ke mi ne komprenas, de kiu vi pruntis la mil ducent talerojn?

NORA. Ĉu vi estas freneza? Ion tian imagi! Unu el niaj amikoj, kiu vizitas nin ĉiun opan tagon! Kia terure ĝena situacio tio estus?

LINDE. Do vere ne li?

NORA. Ne, mi certigas al vi. Neniame eĉ momente povus veni al mi en la kapon --. Tiam li ankaŭ ne havis monon por pruntedoni; nur longe poste li heredis.

LINDE. Nu, tio, mi opinias, estis bonŝanco por vi, mia kara Nora.

NORA. Ne, vere ne; neniame venus al mi en la kapon peti doktoron Rank --. Cetere mi estas tute certa, ke se mi demandus lin --

LINDE. Sed tion vi kompreneble ne faros.

NORA. Kompreneble ne. Ŝajnas al mi, ke mi ne bezonas timi, ke tio fariĝus necesa. Sed mi estas tute certa, ke se mi parolus al doktoro Rank --

LINDE. Malantaŭ la dorso de via edzo?

NORA. Mi devas liberigi min el tio alia; ankaŭ tio estas malantaŭ lia dorso. Mi \_devas\_ liberigi min el tio.

LINDE. Jes ja, tion mi ankaŭ hieraŭ diris; sed --

NORA (paŝadas sur la planko). Viro pli bone ol virino manipulas tiaĵojn --

LINDE. La edzo, jes.

NORA. Babilaĉo. (haltas) Kiam oni pagas sian tutan ŝuldon, tiam oni ja rericevos la ateston?

LINDE. Kompreneble, jes.

NORA. Kaj oni povas disŝiri ĝin en cent mil pecetojn kaj forbruligi ĝin, -- la abomenan, malpuran paperon!

LINDE (rigardas ŝin atente, formetas la kudraĵon kaj stariĝas malrapide). Nora, vi kaŝas ion por mi.

NORA. Ĉu tiel mi aspektas?

LINDE. Io okazis al vi post hieraŭ matene. Nora, kio estas?

NORA (proksimiĝas al ŝi). Kristine! (aŭskultas) Ts! Torvald nun venis hejmen. Jen; sidigu vin ĉe la infanoj dume. Torvald ne toleras vidi tajloraĵon. Petu al Anne-Marie helpi vin.

LINDE (kolektas kelkajn el la aĵoj). Nu jes, sed mi ne foriros de ĉi tie, antaŭ ol ni sincere interparolis.

(Eliras maldekstren; samtempe Helmer envenas el la antaŭĉambro)

NORA (renkontas lin). Ho, kiom mi atendadis vin, kara Torvald.

HELMER. Ĉu estas la kudristino --?

NORA. Ne, estas Kristine, ŝi helpas min pretigi mian kostumon. Imagu kiom belaspekta mi estos.

HELMER. Jes, ĉu ne estis sukcesa ideo de mi?

NORA. Bonega! Sed ĉu mi ne estas ĝentila obeante vin?

HELMER (prenas ŝin sub la mentono). Ĝentila -- ĉar vi obeas vian edzon? Nu, nu, vi eta petolulino, mi bone scias, ke vi nur ŝercas. Sed mi ne volas ĝeni vin; vi devas provi, mi supozas.

NORA. Kaj vi laboros kompreneble?

HELMER. Jes (montras paketon de dokumentoj) Rigardu. Mi vizitis la bankon -- (volas eniri sian ĉambron)

NORA. Torvald.

HELMER (haltas). Jes.

NORA. Se via sciureto elkore petus vin pri io --?

HELMER. Kio do?

NORA. Ĉu vi tion volus fari?

HELMER. Unue mi devas kompreneble scii, kio tio estas.

NORA. La sciuro ĉirkaŭkurus petole, se vi volus esti afabla kaj konsentema.

HELMER. Eldiru do.

NORA. La alaŭdo kvivitus en ĉiuj ĉambroj supre kaj malsupre.

HELMER. Nu ja, tion la alaŭdo ja tamen faras.

NORA. Mi ludus elfknabinon, kaj dancus por vi en la lunlumo, Torvald.

HELMER. Nora, -- ĉu ne estas tio sama, kion vi aludis en la mateno?

NORA (pli proksime). Jes, Torvald, mi vere petegas vin!

HELMER. Kaj vi eĉ kuraĝas remueli tiun aferon?

NORA. Jes, jes, vi devas cedi al mi: Vi devas lasi al Krogstad havi sian oficon en la banko.

HELMER. Mia kara Nora, lian oficon mi decidis por sinjorino Linde.

NORA. Jes, estas ege bonvole de vi; sed vi povas ja maldungi alian oficiston anstataŭ Krogstad.

HELMER. Tio ja estas nekredibla obstineco! Ĉar vi delogiĝis senpripense doni promeson pledi por li, mi farus --!

NORA. Ne estas tial, Torvald. Estas por vi mem. Tiu viro skribas ja en la plej fiaj gazetoj; tion vi ja mem diris. Li povas fari al vi nedireblan malbonon. Vere mi morte timas lin --

HELMER. Aha, mi komprenas; estas malnovaj memoraĵoj kiuj hantas vin.

NORA. Al kio vi aludas?

HELMER. Evidente vi pensas pri via patro.

NORA. Jes; jes certe. Memoru nur kiel malicaj homoj skribis en la gazetoj pri paĉjo, kaj kalumniis lin tiel kruele. Mi kredas, ke ili igus lin maldungata, se la ministerio ne estus vin sendinta tien por ekzameni, kaj se vi ne estus tiom bonvola kaj helpema al li.

HELMER. Mia Nonjo; estas konsiderinda diferenco inter via patro kaj mi. Via patro ne estis neriproĉebla ŝtata oficisto. Sed tio estas mi; kaj tio, mi esperas, ke mi restos tiom longe kiom mi tenas mian oficon.

NORA. Ho, neniu scias kion malicaj homoj povas elpensi. Nun ni povus vivi hejmece, trankvile kaj feliĉe ĉi tie en nia paca senzorga hejmo, -- vi kaj mi kaj la infanoj, Torvald! Jen kial mi petas vin el mia koro --

HELMER. Kaj ĝuste per via propeto pri li vi nebligas al mi reteni lin. Estas jam konate en la banko, ke mi volas maldungi tiun Krogstad. Se nun oni dirus, ke la nova bankdirektoro permesus al sia edzino ŝanĝi lian decidon --

NORA. Jes, kaj kio do --?

HELMER. Ne, kompreneble; kiam oni nur plenumus la volon de la obstinulineto --. Mi ridindigus min antaŭ la tuta personaro, -- pensigus al la homoj, ke mi estas dependanta de ĉiaspecaj fremdaj influoj? Ja, kedu, mi baldaŭ spertus la rezultojn! Kaj krome, -- estas rilato koncerne Krogstad, kiu igas lin neuzebla en la banko, tiom longe kiom mi staras kiel direktoro.



NORA. Kaj kio do estas tio?

HELMER. Pri lia morala difekto mi eble povus fermi la okulojn --

NORA. Jes, ĉu ne, Torvald?

HELMER. Kaj mi aŭdas, ke li ankaŭ estas sufiĉe lerta. Sed li estas dejuneca konato de mi. Estas unu el tiuj senkonsideraj konatecoj, de kiuj oni multfoje poste estas ĝenata. Nu, mi povas ja diri al vi tute senpere: Ni antaŭnomiĝas. Kaj tiu nediskreta homo tion ne kaŝas, kiam aliuloj ĉeestas. Kontraŭe, -- li opinias ke tio rajtigas lin familiare konduti al mi; kaj ĉiumomente li anoncas sian: "Vi, vi Torvald." Mi asertas al vi, ke tio tuŝas min malagrabla. Li farus mian staton en la banko netolerebla.

NORA. Torvald, ĉio ĉi ne estas via sincera opinio.

HELMER. Nu? Kaj kial ne?

NORA. Ne, ĉar estas ja nur malgrandanimaj konsideroj.

HELMER. Kion vi diras? Malgrandanimaj? Vi trovas min malgrandanima!

NORA. Ne, kontraŭe, kara Torvald; kaj ĝuste tial --

HELMER. Egale; vi nomas miajn motivojn malgrandanimaj; do ankaŭ mi tia estas. Malgrandanima! Nu, tiel! -- KREDU MIN, tio nun havu finon. (iras al la pordo de la antaŭĉambro kaj vokas) Helene!

NORA. Kion vi volas?

HELMER (serĉas inter siaj paperoj). Decidon. (La \_ĉambristino\_ envenas.)

HELMER. Jen; prenu tiun ĉi leteron; iru kun ĝi tuj; trovu portiston, kaj igu lin ekspedi ĝin. Sed rapide. La adreso estas surskribita. Jen mono.

ĈAMBRISTINO. Bone. (eliras kun la letero)

HELMER. Jen jen, mia eta sinjorino obstinulino.

NORA (senspire). Torvald, -- kiu letero estis tiu?

HELMER. La maldungo de Krogstad.

NORA. Revoku ĝin, Torvald! Ankoraŭ estas tempo. Ho, Torvald, revoku ĝin! Faru tion por mi; -- por vi mem; por la infanoj! Aŭdu, Torvald; faru! Vi ne scias, kion tio povos venigi sur nin ĉiujn.

HELMER. Tro malfrue.

NORA. Jes, tro malfrue.

HELMER. Kara Nora, mi pardonas al vi tiun timon, kiu kaptis vin, kvankam ĝi funde estas insulto kontraŭ mi. Jes, vere estas! Aŭ ĉu ne estas insulto kredi, ke mi timu venĝon de tia povra fijuristo? Sed mi tamen pardonas vin, ĉar la timo bele atestas pri via granda amo al mi. (prenas ŝin inter siajn brakojn) Tiel estu, mia propra kara Nora. Okazu kio ajn. Kiam vere gravas, kredu, mi havas kuraĝon kaj fortojn. Vi vidos, ke mi estas viro por preni ĉion sur min.

NORA (timigita). Kion vi aludas per tio?

HELMER. Mi diras: Ĉion --

NORA (decide). Tion vi neniam en eterno faru.

HELMER. Bone, do ni dividu, Nora, -- kiel edzo kaj edzino. Estas kiel devas esti. (karesas ŝin) Ĉu vi nun estas kontenta? Nu, nu, nu; ne tiujn timajn kolombokulojn. La tuto estas ja nuraj senenhavaj imagaĵoj. -- Nun vi devus traludi la Tarantelon kaj ekzerci per la tamburino. Mi sidigos min en la interna kontoro kaj fermos ambaŭ pordojn, sekve mi aŭdos nenion; vi povos fari tiom da bruo kiom vi deziras. (turnas sin ĉe la pordo) Kaj kiam doktoro Rank venos, diru al li kie li trovos min.

(Li kapsalutas ŝin, iras kun siaj dokumentoj en sian ĉambron kaj fermas post si)

NORA (konfuzita de timo, staras kvazaŭ najlita, flustras). Li estis kapabla fari tion. Li faras. Li faros spite al ĉio en la mondo. -- Ne, neniam en eterneco tion! Prefere kion ajn! Savon! -- Eliron -- (oni sonorigas en la antaŭĉambro) Doktoro Rank --! Prefere kion ajn! Prefere \_ĉion\_, kio ajn ĝi estu!

(Ŝi glatigas sian vizaĝon, rektigas sin, kaj iras por malfermi la pordon de la antaŭĉambro. \_Doktoro Rank\_ staras tie, pendigante sian pelton; dum la sekvanta sceno malheliĝas.)

NORA. Bonan tagon, doktoro Rank. Mi rekonas vian sonorigadon. Sed ne eniru ĉe Torvald nun; ĉar mi opinias ke li estas iom okupata.

RANK. Kaj vi?

NORA (dum li eniras kaj ŝi fermas la pordon malantaŭ li). Ho, tion vi bone scias, -- por vi mi ĉiam havas kroman tempon.

RANK. Pro tio dankon. De tio mi profitos tiom longe kiom mi povos.

NORA. Al kio vi aludas? Tiom longe, kiom vi povos?

RANK. Jes. Ĉu tio skuas vin?

NORA. Nu, estas iom stranga esprimo. Ĉu io okazus?

RANK. Okazos tio, pri kio mi longe estas pretigita. Sed mi vere ne kredis, ke okazus tiom frue.

NORA (prenas lian brakon). Pri kio vi sciigis? Doktoro Rank, diru al mi!

RANK (sidigas sin apud la forno). Pri mi malboniĝas, kaj estas nenio farebla pri tio.

NORA (spiras liberigita). Pri vi --?

RANK. Pri kiu alia? Ne utilas mensogi por si mem. Mi estas la plej mizera el ĉiuj miaj pacientoj, Sinjorino Helmer. Dum kelkaj tagoj mi faris ĝeneralan bilancon de mia interna stato. Bankroto. Post unu monato mi eble kuŝos putrante tie supre en la tombejo.

NORA. Fi, fi, kiel naŭze vi parolas.

RANK. La afero ankaŭ estas malbenite naŭza. Sed la plej naŭza estas, ke antaŭos tiom da aliaj abomenaĵoj. Restas nur unu sola

ekzameno; kiam tiu estos finita, mi scios proksimume, kiam komenciĝos la putrado. Estas io, kion mi volas diri al vi. Helmer pro sia delikata naturo sentas karakterizan abomenon kontraŭ ĉio malbelega. Mi ne volas akcepti lin en mian malsanulĉambron.

NORA. Ho, tamen doktoro Rank --

RANK. Mi ne volas havi lin tie. Neniel. Mi fermos mian pardonon por li. -- Tuj kiam mi certe scios pri la dissolveco, mi sendos al vi mian vizitkarton kun nigra kruco, kaj tiam vi scios, ke la diseriga abomenaĵo komenciĝis.

NORA. Ne ne, hodiaŭ vi estas ja tute absurda. Kaj mi kiu tiom dezirus, ke vi estu en precipe bona humoro.

RANK. Kun la morto en la manoj? -- Kaj tiel punpagi por la kulpo de aliulo. Ĉu estas justeco en tio? Kaj en kiu ajn familio regas iamaniere tia senkompata fatalo --

NORA (kovras la orelojn). Pa, pa! Gaje; gaje!

RANK. Jes, mi ĵuras, la tuto estas efektive nura ridindaĵo. Mia povra, senkulpa spino devas suferi pro la gajaj leŭtenantaj tagoj de mia patro.

NORA (apud la maldekstra tablo). Li ja fordonis sin al asparagoj kaj pasteĉoj el anserhepato. Ĉu ne tiel?

RANK. Jes; kaj al trufoj.

NORA. Jes trufoj, jes ja. Kaj al ostroj, mi kredas?

RANK. Jes ostroj, ostroj; kompreneble.

NORA. Jes, kaj aldone la boteloj da portvino kaj ĉampano. Bedaŭrinde ke ĉiuj tiuj delikataĵoj ataku la spinon.

RANK. Precipe bedaŭrinde ĉar ili atakas malfeliĉan spinon, kiu ĝuis eĉ ne guton da ili.

NORA. Ak jes, estas ja tio la plej bedaŭrinda.

RANK (rigardas ŝin explore). Hm --

NORA (iom poste). Kial vi ridetis?

RANK. Ne, estas vi kiu ridis.

NORA. Ne, estas vi kiu ridetis, doktoro Rank!

RANK (ekstaras). Vi certe estas pli granda petolulino, ol mi imagis.

NORA. Mi estas tiel incitita al frenezaĵoj hodiaŭ.

RANK. Aspektas tiel.

NORA (kun la manoj sur liaj ŝultroj). Kara, kara doktoro Rank, vi ne formortu de Torvald kaj mi.

RANK. Nu, tiun postsopiron vi certe eltenos facile. Tiu baldaŭ forgesiĝas, kiu foriras.

NORA (rigardas lin en timo). Vi tion opinias?

RANK. Oni ligas novajn kontaktojn, kaj tiam --

NORA. Kiu ligas novajn kontaktojn?

RANK. Tion faros vi ambaŭ, kiam mi estos for. Vi mem jam estas sur la vojo, mi opinias. Pro kio ĉeestis tiu sinjorino Linde ĉi tie hieraŭ?

NORA. Aha. -- ĉu vere vi estas ĵaluza pri la kompatinda Kristine?

RANK. Jes, mi estas. Ŝi prenos mian lokon en la domo. Kiam mi forestos, eble tiu ino --

NORA. Ts, ne parolu tiom laŭte; ŝi sidas en la apuda ĉambro.

RANK. Eĉ hodiaŭ? Jen vi vidas.

NORA. Nur por kudri mian kostumon. Bona Dio, kiom maljusta vi estas. (eksidas sur la sofono) Estu saĝa, doktoro Rank; morgaŭ vi vidos kiel bele mi dancos; kaj tiam vi imagu, ke mi tion faras nur por vi, -- ja, kompreneble ankaŭ por Torvald; evidente. (prenas kelkajn aĵojn el la skatolo) Doktoro Rank, sidigu vin ĉi tie, kaj mi montros ion al vi.

RANK (sidigas sin). Kio estas?

NORA. Jen. Rigardu!

RANK. Silkoŝtrumpojn.

NORA. Karnokolorajn. \_Delikatajn\_, ĉu ne? Tamen nun estas mallume; sed morgaŭ -- Ne, ne, ne; vi nur rigardu la piedpecon. Nu do, vi povas vidi ankaŭ la supron.

RANK. Hm --

NORA. Kial vi aspektas tiel kritikema? Ĉu vi kredas ke ili ne estas laŭmezuraj?

RANK. Pri tio neblas por mi havi iun pravigitan opinionon.

NORA (rigardas lin momenton). Fi, honton al vi. (frapetas lin sur la orelon per la ŝtrumpoj) Tio estu por vi. (ree enpakas ilin)

RANK. Kaj kiujn aliajn admirindaĵojn povos mi vidi?

NORA. Eĉ ne iometon pli vi rajtas vidi; ĉar vi estas malbonkondata. (ŝi kantetas kaj serĉas inter la aĵoj)

RANK (post mallonga paŭzo). Kiam mi sidas tiel tute intime kune kun vi, tiam mi ne komprenas -- ne, mi ne konceptas -- kio fariĝus el mi se mi neniam estus veninta en tiun ĉi domon.

NORA (ridetas). Jes, mi vere opinias, ke vi sentas vin sufiĉe komforta ĉe ni.

RANK (pli mallaŭte; rigardas antaŭen). Kaj jen esti devigata forlasi ĉion --

NORA. Pa, pa; vi nenion forlasos.

RANK (kiel antaŭe). -- kaj eĉ ne povran signon de dankemo povas mi postlasi; apenaŭ efemeran postsopiron, -- nenio krom vaka loko, kiun la unue venanta povos okupi.

NORA. Kaj se mi nun petus vin pri --? Ne --

RANK. Pri kio?

NORA. Pri granda pruvo pri via amikeco --

RANK. Jes, Jes?

NORA. Nu, mi celas, -- ege grandan servon --

RANK. Ĉu vi vere unu fojon volus igi min tiom feliĉa?

NORA. Ho, vi ja tute ne scias, pri kio temas.

RANK. Nu, bone; do diru al mi.

NORA. Ne, ĉar mi ne povas, doktoro Rank; estas io tiom ekstreme ega, -- kaj konsilo kaj helpo kaj servo --

RANK. Des pli bone. Estas por mi neimageble al kio vi aludas. Sed diru do. Ĉu mi ne havas vian konfidon?

NORA. Jes, vi havas pli ol kiu ajn alia homo. Vi estas mia plej fidela kaj bona amiko, mi ja scias. Ĝuste tial mi volas diri tion al vi. Do bone, doktoro Rank; estas io, kion vi devas helpi min, ke ne okazu. Vi scias kiom kore, korege Torvald amas min; neniun momenton li hezitus fordoni sian vivon por mi.

RANK (klinita kontraŭ ŝi). Nora, -- ĉu vi do kredas, ke li estas la sola --?

NORA (kun ekmoveto). -- kiu --?

RANK. Kiu ĝoje fordonus sian vivon por vi.

NORA (peze). Nu do tiel.

RANK. Mi ĵuris en mi mem, ke vi tion sciu, antaŭ ol mi foriros. Pli bonan okazon mi neniam trovus. -- Jes, Nora, nun vi scias. Kaj nun vi ankaŭ scias, ke al mi vi povas vin konfidi, kiel al neniuj alia.

NORA (stariĝas; trankvile kaj sen abrupto). Lasu min pasi.

RANK (liberigas lokon por ŝi, sed restas sidanta). Nora --

NORA (ĉe la pordo de la antaŭĉambro). Helene, enportu la lampon -- (iras al la forno) Ak, kara doktoro Rank, tio estis vere malbele farita de vi.

RANK (ekstaras). Ke mi amas vin eĉ pli profunde ol kiu ajn alia? Ĉu \_tio\_ estas malbela?

NORA. Ne, sed ke vi lasis vin mem elbabili. Tio estis ja tute ne necesa --

RANK. Kion vi aludas? Ĉu vi do sciis --?

(La \_ĉambristino\_ envenas kun la lampo, metas ĝin sur la tablon kaj ree eliras.)

RANK. Nora, -- sinjorino Helmer, -- mi demandas vin, ĉu vi ion sciis?

NORA. Ho, kiel mi sciu, kion mi sciis aŭ ne sciis? Mi vere ne

povas diri al vi --. Ho, ke vi estus tiel mallerta, doktoro Rank!  
Ĉio estis ja nun tiel bona.

RANK. Nu, vi almenaŭ nun scias, ke mi estas je via dispono kun vivo kaj animo. Ĉu vi nun volas malkaŝe paroli?

NORA (rigardas lin). Post tio?

RANK. Mi petas vin, sciigu al mi kio estas.

NORA. Nenion vi povas nun ekscii.

RANK. Tamen tiel vi ne devas puni min. Permesu al mi fari por vi tion, kio estas en homa eblo.

NORA. Nun vi povas por mi nenion fari. -- Cetere mi ne bezonas iun helpon. Eble ĉio estas nur imagaĵoj. Certe tiel estas. Kompreneble! (sidigas sin en la balancan seĝon, rigardas lin, ridas) Ja, ja, doktoro Rank, vi vere estas iom galanta sinjoro. Kaj ĉu vi ne trovas kaŭzon por honto, nun kiam la lampo estas enportita?

RANK. Ne; vere ne! Sed eble mi foriru -- por ĉiam?

NORA. Ne, tion vi absolute ne faru. Kompreneble vi venu ĉi tien kiel ĝis nun. Vi bone scias, ke Torvald ne povas malhavi vin.

RANK. Jes, sed \_vi\_?

NORA. Ho, mi ĉiam trovas ke fariĝas ege amuze, kiam vi venas.

RANK. Estas ĝuste tio, kio delogis min sur malĝustan vojon. Vi estas por mi enigmo. Multfoje ŝajnis al mi, ke vi same prefere estis kune kun mi, kiel kune kun Helmer.

NORA. Jes, komprenu, estas ja kelkaj homoj, kiujn oni pleje amas, kaj aliaj homoj kun kiuj oni iel preferas kunesti.

RANK. Nu ja, estas iu senco en tio.

NORA. Kiam mi loĝis hejme, mi ja pleje amis paĉjon. Sed estis por mi ĉiam ege amuze, kiam mi povis ŝteliri en la ĉambron de la servistinoj; ĉar ili tute ne admonadis min; kaj krome ili rakontis tiom tiklajn amuzaĵojn inter si.

RANK. Aha; do estas \_ili\_, kiujn mi anstataŭis.

NORA (saltlevigas sin kaj iras al li). Ho, kara, ege bonanima doktoro Rank, tion mi ne celis. Sed vi bone komprenu, ke estas pri Torvald kiel pri paĉjo --

(La \_ĉambristino\_ venas el la antaŭĉambro)

ĈAMBRISTINO. Sinjorino! (flustras kaj donas al ŝi karton)

NORA (ĵetrigardas la karton). Ah! (metas ĝin en la poŝon)

RANK. Io malagrabra okazanta?

NORA. Ne ne, neniel; estas nur io --; estas mia nova kostumo --

RANK. Kiel? Tie kuŝas ja via kostumo.

NORA. Ho jes, tiu; sed estas alia; mi mendis ĝin -- Torvald ne sciu pri ĝi --

RANK. Aha, tie estas ja la granda sekreto.

NORA. Jes vere; eniru al li; li sidas en la interna ĉambro; tenu lin okupata dume -- -- --

RANK. Estu trankvila; mi ne ellasos lin.

(Li iras en la ĉambron de \_Helmer\_.)

NORA (al la ĉambristino). Li atendas en la kuirejo?

ĈAMBRISTINO. Jes, li suprenvenis la kuirejan ŝtuparon --

NORA. Sed ĉu vi ne diris, ke gasto jam ĉeestas?

ĈAMBRISTINO. Jes, sed ne helpis.

NORA. Li ne volis foriri?

ĈAMBRISTINO. Ne, li ne foriros antaŭ ol li parolis kun sinjorino.

NORA. Do, enlasu lin; sed silente. Helene, vi ne diru al iu ajn; estas surprizo por mia edzo.

ĈAMBRISTINO. Jes ja, mi komprenas -- (ŝi eliras.)

NORA. Okazos la teruraĵo. Ĝi tamen venos. Ne, ne, ne. Ne povas okazi; ne okazu.

(Ŝi iras kaj riglas la pordon de \_Helmer\_.)

(La \_ĉambristino\_ malfermas la pordon de la antaŭĉambro por \_juristo Krogstad\_, kaj fermas malantaŭ li. Li estas vestita en vojaĝpelto, botoj kaj felĉapo.)

NORA (proksimiĝas al li). Parolu mallaŭte; mia edzo estas hejme.

KROGSTAD. Nu, lasu lin.

NORA. Kion vi volas?

KROGSTAD. Informiĝi pri io.

NORA. Do, rapide. Kio estas?

KROGSTAD. Vi certe scias, ke mi ricevis mian maldungon.

NORA. Mi ne povis malhelpi ĝin, sinjoro Krogstad. Mi batalis ĝis ekstremo por via afero; sed helpis neniom.

KROGSTAD. Ĉu via edzo ne havas pli da amo al vi? Li scias pri kio mi povas endanĝerigi vin, sed tamen li kuraĝas --

NORA. Kiel povas vi imagi, ke li sciiĝis pri tio?

KROGSTAD. Ho ne, mi ankaŭ tion ne pensis. Ne karakterizus mian bonan Torvald Helmer montri tiom da vira kuraĝo --

NORA. Sinjoro Krogstad, mi postulas estimon por mia edzo.

KROGSTAD. Dio gardu, ĉian ŝuldatan estimon. Sed ĉar sinjorino tiel timeme tenas la aferon kaŝita, mi rajtas supozi, ke post hieraŭ vi iom pli bone informiĝis pri la graveco de tio, kion vi

vere faris?

NORA. Pli ol \_vi\_ iam ajn povus al mi instrui.

KROGSTAD. Jes, tia malbona juristo, kia mi estas --

NORA. Kion vi intencas pri mi?

KROGSTAD. Nur vidi kiel pri vi statas, sinjorino Helmer. Mi estas pensanta pri vi la tutan tagon. Vidu, enkasigisto, leĝkanajlo, iu -- nu iu, kiel mi, ankaŭ havas iom da tio, kion oni nomas bonkorecon.

NORA. Do montru tion; pripensu miajn etajn infanojn.

KROGSTAD. Ĉu vi kaj via edzo pensis pri la miaj? Sed lasu nun tion. Mi nur volis diri, ke ne necesas trakti tiun aferon tro serioze. Ĝis plue ne okazos iu jura plendo de mia flanko.

NORA. Ho jes, ĉu ne; tion mi ja sciis.

KROGSTAD. La aferon ni povas ordigi per interkonsento; ne necesas publikigi ĝin; ĝi restos inter ni tri.

NORA. Mia edzo devas nenion pri tio scii.

KROGSTAD. Kiel vi povas malhelpi tion? Ĉu eble vi povas pagi la restantan sumon?

NORA. Ne, ne tuj.

KROGSTAD. Aŭ ĉu vi eble vidas rimedon havigi monon unu el la proksimajn tagojn?

NORA. Neniun rimedon kiun mi volas uzi.

KROGSTAD. Nu, ĉiuokaze por vi ne utilis. Se vi starus ĉi tie kun la plej granda sumo imagebla en la mano, vi tamen ne rericivus de mi vian ŝuldateston.

NORA. Do, klarigu al mi por kio vi ĝin uzos.

KROGSTAD. Mi nur retenos ĝin, -- gardos ĝin zorge. Neniu nekonzernato ion flaros. Se vi tial estus pensanta pri iu ekstrema decido en malespero --

NORA. Mi faras.

KROGSTAD. -- se vi intencus forkuri de domo kaj hejmo --

NORA. Mi faras!

KROGSTAD. -- aŭ se vi pensus pri tio, kio estas ankoraŭ pli malespera --

NORA. Kiel vi povas scii tion?

KROGSTAD. -- forviŝu tiajn ideojn.

NORA. Kiel vi povas scii, ke mi pensas pri \_tio\_?

KROGSTAD. La plimulto el ni pensas \_tiel\_ komence. Ankaŭ mi pensis pri tio; sed honton al mi, mi ne havis kuraĝon --

NORA (senvoĉe). Ankaŭ mi ne.



KROGSTAD (senŝarĝigita). Ĉu ne vere; ankaŭ vi ne kuraĝas?

NORA. Mi ne kuraĝas; mi ne kuraĝas.

KROGSTAD. Estus ankaŭ ega stultaĵo. Post la kulmino de la unua familia ŝtormo --. Mi havas en mia poŝo leteron al via edzo --

NORA. Kaj tie vi rakontas ĉion?

KROGSTAD. En kiel eble plej indulgaj esprimoj.

NORA (rapide). Tiun leteron li ne ricevu. Disŝiru ĝin. Mi tamen havigos monon.

KROGSTAD. Pardonu, Sinjorino, sed ĉu mi ne ĵus diris al vi --

NORA. Ba! Mi ne parolas pri la mono, kiun mi al vi ŝuldas. Diru al mi kioman sumon vi postulas de mia edzo, kaj mi havigos al vi la monon.

KROGSTAD. Mi postulas neniun monon de via edzo.

NORA. Kion vi do postulas?

KROGSTAD. Tion vi sciu. Mi volas min restarigi, sinjorino; volas supren; kaj por tio via edzo helpu min. Dum unu jaro kaj duono mi faris nenion malhonestan; en tiu periodo mi batalis kontraŭ peniga malriĉeco; mi estis kontenta laborigante min supren ŝtupon post ŝtupo. Nun mi estas forpelita, kaj mi ne lasas min kontentigi nur per indulga reakcepto. Mi volas supren, aŭdu. Mi volas reen en la bankon, -- ekhavi pli altan postenon; via edzo starigu postenon por mi --

NORA. Tion li neniam faros!

KROGSTAD. Li faros; mi konas lin; li eĉ ne kuraĝos grumbli. Tuj kiam mi estos tie interne kune kun li, vi vidos! Post jaro mi estu la dekstra mano de la direktoro. Estos Nils Krogstad kaj ne Torvald Helmer, kiu estos la Akciobankon.

NORA. Tion vi neniam spertos!

KROGSTAD. Eble vi volas --?

NORA. Nun mi kuraĝas.

KROGSTAD. Pa, vi ne timigas min. Delikata, dorlotata sinjorino, kiel vi --

NORA. Vi vidos; vi vidos!

KROGSTAD. Sub la glacio, eble? Profunde en la malvarma, karbonigra akvo? Kaj poste en la printempo flosanta elprofunde, malbela, nerekonebla, kun defalanta hararo.

NORA. Vi ne timigas min.

KROGSTAD. Ankaŭ vi ne timigas min. Tiaĵojn oni ne faras, sinjorino Helmer. Krome por kio utilis? Mi tamen havas lin en la poŝo.

NORA. Poste? Kiam mi ne plu --?

KROGSTAD. Ĉu vi forgesas, ke tiam \_mi\_ decidis pri via reputacio?

( \_Nora\_ konsternita staras lin rigardante)

KROGSTAD. Nu jes, nun mi avertis vin. Ne faru iun stultajon. Kiam Helmer estos ricevinta mian leteron, mi atendos mesaĝon de li. Kaj bone memoru, ke estas via edzo, kiu mem devigis min denove iri tian vojon. Tion mi neniam pardonos al li. Adiaŭ, sinjorino. (Li eliras tra la antaŭĉambro.)

NORA (al la pordo de la antaŭĉambro, malfermas ĝin duone kaj ŝtelaŭskultas). Foriras. Ne liveras la leteron. Ho ne, ne, estus ja tute neeble! (malfermas la pordon pli kaj pli) Kio estas? Li staras ekstere. Ne malsupreniras la ŝtuparon. Ĉu li hezitas? Li eble --?

(Letero falas en la leterskatolon; poste oni aŭdas la paŝojn de \_Krogstad\_ perdiĝantaj malsupre de la ŝtuparo)

NORA (kun mallaŭta ekkrio, kuras trans la plankon kaj al la tablo apud la sofo; mallonga paŭzo). En la leterskatolo! (ŝteliras timeme al la pordo de la antaŭĉambro) Tie ĝi kuŝas. -- Torvald, Torvald, -- nun ni estas sensavaj!

LINDE (venas kun la kostumo el la maldekstra ĉambro). Nun mi ne trovas ion plian por ripari. Eble ni surprovu --?

NORA (raŭke kaj mallaŭte). Kristine, venu ĉi tien.

LINDE (ĵetas la kostumon sur la sofon). Kio estas al vi? Vi aspektas kiel konfuzita.

NORA. Venu. Vi vidas tiun leteron? \_Tie\_; vidu, -- tra la vitraĵo en la leterskatolo.

LINDE. Jes, jes; mi bone vidas.

NORA. Tiu letero estas de Krogstad --

LINDE. Nora, -- estas Krogstad, kiu pruntedonis al vi la monon!

NORA. Jes, kaj nun Torvald sciiĝos pri ĉio.

LINDE. KREDU min, Nora, estas la pli bona por vi ambaŭ.

NORA. En tio estas pli, ol vi scias. Mi skribis falsan nomon.

LINDE. Sed pro la ĉielo --?

NORA. Nun restas nur diri al vi, Kristine, ke vi estu mia atestanto.

LINDE. Atestanto? Kiel? Kion mi --?

NORA. Se mi freneziĝos, -- kaj tio ja povus okazi --

LINDE. Nora!

NORA. Aŭ se io alia al mi okazus, -- io, tiel ke mi ne povus ĉeesti tie ĉi --

LINDE. Nora, Nora, vi estas ja tute kiel freneza!

NORA. Se estus iu, kiu volus preni sur sin la tutan kulpon, vi komprenas --

LINDE. Jes, ja, sed kiel vi povus pensi --?

NORA. Tiam vi atestu, ke ne estas vero, Kristine. Mi tute ne estas freneza; mi havas mian plenan prudenton nun; kaj mi diras al vi: Neniu alia sciis pri la afero. Mi sola faris ĉion. Memoru tion.

LINDE. Mi faros. Sed mi ne komprenas ĉion ĉi.

NORA. Ho, kiel vi tion komprenus? Estas ja la mirindaĵo, kiu nun okazos.

LINDE. La mirindaĵo?

NORA. Jes, la mirindaĵo. Sed estas tiom terure, Kristine; ĝi nepre ne okazu, ne por kiu ajn prezo en la mondo.

LINDE. Mi iros rekte por paroli kun Krogstad.

NORA. Ne iru al li; li faros al vi ion malbonan!

LINDE. Estis tempo, kiam li volonte farus kion ajn por mi.

NORA. Li?

LINDE. Kie li loĝas?

NORA. Ho, kion mi scias --? Jes, (serĉas en la poŝo) Jen lia karto. Sed la letero, la letero --!

HELMER (en sia ĉambro, frapas la pordon). Nora!

NORA (krias pro timo). Ho, kio estas? Kion vi volas?

HELMER. Nu, nu, ne timu. Ni ja ne venos; vi ja ŝlosis la pordon; eble vi surprovas?

NORA. Jes, jes, mi surprovas. Mi estos tiom bela, Torvald.

LINDE (kiu legis la karton). Li ja loĝas ĝuste trans la stratangulo.

NORA. Jes; sed ne helpas. Ni estas sensavaj. La letero kuŝas ja en la skatolo.

LINDE. Kaj via edzo havas la ŝlosilon?

NORA. Jes, ĉiam.

LINDE. Krogstad devas revoki sian leteron nelegita, li devas elpensi iun pretekston --

NORA. Sed ĝuste je tiu ĉi tempo Torvald kutime --

LINDE. Igu lin prokrasti; eniru dume. Mi revenos plej eble baldaŭ. (ŝi eliras rapide tra la antaŭĉambro)

NORA (iras al la pordo de \_Helmer\_, malfermas ĝin kaj enrigardas). Torvald!

HELMER (en la interna ĉambro). Nu, ĉu oni fine rajtas ree enveni en sian propran ĉambron? Venu, Rank, nun ni fine rigardu. (ĉe la pordo) Sed kio estas?

NORA. Kio, kara Torvald?

HELMER. Rank preparis min por grandioza kostumado.

RANK (ĉe la pordo). Laŭ mia percepto; sed mi do eraris.

NORA. Jes, neniuj rajtas admiri min en mia pompo antaŭ morgaŭ.

HELMER. Sed kara Nora, vi aspektas vere streĉita. Ĉu vi tro multe ekzercis?

NORA. Ne, mi ankoraŭ tute ne ekzercis.

HELMER. Estos tamen necese --

NORA. Jes, estos tute necese, Torvald. Sed mi neniel progresas sen via helpo; mi ĉion tute forgesis.

HELMER. Nu, ni baldaŭ refreŝigu ĉion.

NORA. Jes, vi devas helpi min, Torvald. Promesu al mi! Ho, mi tiom timas. La grandan festenon --. Vi devas dediĉi vin tute por mi ĉi-vespere. Eĉ ne etan bankaferon; eĉ ne plumon en la mano. Do? Ĉu ne, kara Torvald?

HELMER. Mi promesas; hodiaŭ vespere mi estos tute je via dispono, -- vi senhelpa etulino. -- Hm, jen, unue ion -- (iras al la pordo de la antaŭĉambro)

NORA. Kion vi volas rigardi tie?

HELMER. Nur vidi ĉu venis letero.

NORA. Ne, ne; ne faru, Torvald!

HELMER. Kion do?

NORA. Torvald, mi petas vin; estas neniuj.

HELMER. Permesu al mi rigardi. (volas iri)

(\_Nora\_, ĉe la piano, frapas la unuajn taktojn de la \_Tarantelo\_)

HELMER (ĉe la pordo, haltas). Aha!

NORA. Mi ne povas danci morgaŭ, se mi ne ekzercos kun vi.

HELMER (iras al ŝi). Ĉu vi vere estas tiom timema, kara Nora?

NORA. Jes, ege timema. Lasu min ekzerci nun tuj; ankoraŭ estas tempo antaŭ la manĝo. Jen, sidigu vin kaj ludu por mi, kara Torvald; korektu min; donu instrukcion, kiel vi kutimas.

HELMER. Volonte, tre volonte, ĉar vi deziras.

(Li eksidas ĉe la piano)

NORA (prenas la tamburinon el la skatolo, kaj ankaŭ longan, multekoloran ŝalon, per kiu ŝi rapide drapiras sin; post salto mezen sur la plankon ŝi staras tie kaj vokas). Ludu nun por mi! Nun mi volas danci!

(\_Helmer\_ ludas kaj \_Nora\_ dancas; \_doktoro Rank\_ staras apud la piano malantaŭ \_Helmer\_, rigardante)

HELMER (ludante). Malpli rapide, -- malpli rapide.

NORA. Mi ne povas alimaniere.

HELMER. Ne tiel impete, Nora!

NORA. Ĝuste tiel devas esti.

HELMER (haltas). Ne, ne, tio tute ne taŭgas.

NORA (ridas, kaj svingas la tamburinon). Ĉu mi ne diris tion al vi?

RANK. Permesu al mi ludi por ŝi.

HELMER (ekstaras). Jes, vi faru; kaj mi povos pli bone instrukcii ŝin.

(Rank sidigas sin ĉe la piano kaj ludas; Nora dancas pli kaj pli sovaĝe. Helmer prenis pozicion apud la forno, kaj ofte direktas al ŝi rimarkojn por korekti ŝin; ŝi ŝajne ne aŭdas tion; ŝia hararo malligiĝas kaj falas sur ŝiajn ŝultrojn; ŝi ne atentigas tion, sed daŭrigas la dancadon. Sinjorino Linde envenas)

LINDE (staras konsternita ĉe la pordo). Oj --!

NORA (dum la danco). Jen amuzo, Kristine.

HELMER. Sed kara, inda Nora, vi ja dancas kvazaŭ estus por savo de la vivo.

NORA. Vere ja estas!

HELMER. Rank, ĉesu; tio estas ja pura frenezaĵo. Ĉesu, mi diras.

(Rank ĉesas ludi, kaj Nora subite haltas)

HELMER (al ŝi). Tion mi neniam kredus. Vi ja forgesis ĉion, kion mi instruis al vi.

NORA (forĵetas la tamburinon). Jen vi mem vidas.

HELMER. Do, jen instruo estas bezonata.

NORA. Jes, vi vidas kiom necese estas. Vi devas instrui min ĝis la fino. Ĉu vi tion promesas al mi, Torvald?

HELMER. Vi povas fidi pri tio.

NORA. Vi ne devas, hodiaŭ nek morgaŭ, zorgi pri io alia krom mi; vi ne malfermu leteron, -- ne malŝlosu la leterskatolon --

HELMER. Aha, ankoraŭ la timo pro tiu homo --

NORA. Jes, jes ja, ankaŭ tio.

HELMER. Nora, mi vidas de via konduto, ke jam kuŝas letero de li.

NORA. Mi ne scias; mi opinias ke jes; sed vi ne legu ion tian nun; nenio malbela devas entrudi sin inter ni antaŭ ol ĉio atingis la finon.

RANK (mallaŭte al Helmer). Vi ne devas kontraŭdiri ŝin.

HELMER (ĉirkaŭbrakas ŝin). Ni plenumu la volon de la infano.  
Sed morgaŭ nokte, kiam vi estos dancinta --

NORA. Tiam vi estos libera.

ĈAMBRISTINO (ĉe la pordo maldekstre). Sinjorino, la tablo estas  
preta.

NORA. Ni volas havi ĉampanon, Helene.

ĈAMBRISTINO. Bone, sinjorino. (eliras)

HELMER. Aha, -- granda festeno do?

NORA. Ĉampanofesteno ĝis la hela mateno. (ekkrias) Kaj kelkajn  
makaronojn, Helene, multajn, -- unusolan fojon.

HELMER (prenas ŝiajn manojn). Nu, nu, nu; ne tiu delira  
sovaĝeco. Estu nun mia propra alaŭdeto kiel ordinare.

NORA. Jes ja, mi estu. Sed eniru dume; ankaŭ vi, doktoro Rank.  
Kristine, vi devas helpi min aranĝi miajn harojn.

RANK (mallaŭte, elirante). Supozeble ne estas io -- io tia  
okazonta?

HELMER. Neniel, kara; estas nenio alia krom tiu infaneca timo,  
kiun mi menciis al vi.

(Ili eliras dekstre)

NORA. Nu!?

LINDE. Forvojaĝis en la kamparon.

NORA. Mi divenis laŭ via aspekto.

LINDE. Li revenos hejmen morgaŭ vespere. Mi skribis letterslipon  
al li.

NORA. Tion vi ne devus fari. Vi malhelpu nenion. Funde estas  
ĝojego, tio, atendadi la mirindaĵon.

LINDE. Efektive, kion vi atendas?

NORA. Ho, tion vi ne povas kompreni. Eniru al ili; mi tuj  
postvenos. (\_sinjorino Linde\_ eniras la manĝoĉambron)

NORA (staras momenton kvazaŭ por sin orienti; poste ŝi rigardas  
sian horloĝon). La kvina. Sep horojn ĝis noktomezo. Poste, dudek  
kvar horojn ĝis sekvonta noktomezo. Tiam la Tarantelo estos  
dancita. Dudek kvar plus sep? Tridek unu horojn por vivi.

HELMER (ĉe la pordo dekstre). Sed kie restas la alaŭdeto?

NORA (al li kun larĝe etenditaj brakoj). Jen la alaŭdeto!

TRIA AKTO

(Sama ĉambro. La sofotablo kun seĝoj ĉirkaŭe estas metita  
antaŭen meze sur la planko. Lampo lumas sur la tablo. La pordo de

la antaŭĉambro estas malfermita. Aŭdiĝas dancmuziko de la supra etaĝo.)

(\_Sinjorino Linde\_ sidas ĉe la tablo foliumante libron seninterese; provas legi, sed ne aspektas kapabla koncentri la pensojn; iujn fojojn ŝi streĉe aŭskultas en la direkto de la ekstera pordo.)

LINDE (rigardas sian horloĝon). Ankoraŭ ne. Kaj nun jam urĝas. Se li nur ne -- (denove aŭskultas) Jen, tie li estas. (Ŝi eliras en la antaŭĉambro, kaj singarde malfermas la eksteran pordon; kvietaj paŝoj aŭdiĝas sur la ŝtuparo; ŝi flustras:) Envenu. Ĉeestas neniu.

KROGSTAD (ĉe la pordo). Mi trovis leterslipon de vi hejme. Kion tio signifas?

LINDE. Mi absolute devas paroli kun vi.

KROGSTAD. Nu? Kaj tio absolute devas okazi en tiu ĉi domo?

LINDE. Hejme ĉe mi ne eblas; mia ĉambro ne havas apartan enirejon. Envenu; ni estas tute solaj; la ĉambristino dormas, kaj la gesinjoroj Helmer estas en balo supre.

KROGSTAD (venas en la ĉambro). Jen, jen. La gesinjoroj Helmer dancas ĉi-vespere? Fakte?

LINDE. Jes, kial ne?

KROGSTAD. Nu jes, kial ne?

LINDE. Nun, Krogstad, nun ni du do kune parolu.

KROGSTAD. Ĉu ni du do havas ion pli por priparoli?

LINDE. Ni havas multon por priparoli.

KROGSTAD. Tion mi ĝis nun ne opiniis.

LINDE. Ne, ĉar vi neniam vere komprenis min.

KROGSTAD. Ĉu estis io pli por kompreni, krom tio, kio estas tiom simpla en la mondo? Senkora virino forpuŝas viron, kiam sin ofertas io, kio estas pli avantaĝa.

LINDE. Ĉu vi opinias, ke mi vere estas tiom senkora? Kaj ĉu vi opinias, ke mi rompis de vi facilkore?

KROGSTAD. Vere ne?

LINDE. Krogstad, ĉu vi tion vere kredis?

KROGSTAD. Se tiel ne estis, kial vi do tiam skribis al mi tian leteron, kian vi skribis?

LINDE. Mi ja ne povis agi alimaniere. Ĉar mi devis rompi kun vi, estis ja ankaŭ mia devo ekstermi en vi ĉion, kion vi por mi sentis.

KROGSTAD (premegas siajn manojn). Tiel do. Kaj tio -- tio nur por mono!

LINDE. Ne forgesu, ke mi havis senhelpan patrinon kaj du etajn fratojn. Ni ne povis atendi vin, Krogstad; pri vi estus ja tiam longa atendado.

KROGSTAD. Nu ja, estis; sed vi ne rajtis forpuŝi min pro alia homo.

LINDE. Nu, mi ne scias. Multajn fojojn mi demandis al mi mem, ĉu mi tion rajtis.

KROGSTAD (pli kviete). Kiam mi vin perdis, sentiĝis, kvazaŭ la firma grundo forglitus de sub miaj piedoj. Rigardu min; nun mi estas ŝiprompito sur vrako.

LINDE. Helpo povus esti proksima.

KROGSTAD. Ĝi estis proksima; sed nun vi venis kaj baris al mi la vojon.

LINDE. Kontraŭ mia scio, Krogstad. Nur hodiaŭ mi eksciis, ke estas vi, kiun mi anstataŭos en la banko.

KROGSTAD. Mi kredas vin, ĉar vi tion diras. Sed nun, kiam vi scias, ĉu vi ne retiras vin?

LINDE. Ne; ĉar tio neniel utilis al vi.

KROGSTAD. Utilus, utilis --; mi tion tamen farus.

LINDE. Mi lernis agi prudente. La vivo kaj la akra, amara neceso instruis tion al mi.

KROGSTAD. Kaj la vivo instruis al mi ne fidi malplenajn frazojn.

LINDE. Do la vivo instruis al vi ion tre saĝan. Sed fidi al agoj vi tamen devas?

KROGSTAD. Al kio vi aludas?

LINDE. Vi diris, ke vi staras kiel ŝiprompito sur vrako.

KROGSTAD. Mi havis bonajn kialojn por tion diri.

LINDE. Ankaŭ mi sidas kiel ŝiprompita virino sur vrako. Neniun por funebri, kaj neniun por prizorgi.

KROGSTAD. Vi mem elektis.

LINDE. Mi tiam ne havis elekton.

KROGSTAD. Nu, kaj kio pli?

LINDE. Krogstad, ĉu eble ni du ŝiprompitoj povus transiri unu al la alia?

KROGSTAD. Kion vi sugestas?

LINDE. Du sur unu vrako staras pli sekure ol unuope sur du.

KROGSTAD. Kristine!

LINDE. Kial, laŭ via supozo, mi venis al la urbo?

KROGSTAD. Ĉu eblus ke vi havus penson pri mi?

LINDE. Mi devas labori, se mi povu elteni la vivon. Ĉiujn miajn vivtagojn, tiom longe kiom mi memoras, mi laboris; kaj tio estis mia plej kontentiga kaj sola plezuro. Sed nun mi staras tute sola



en la mondo, tiel terure malplena kaj forlasita. Labori nur por si mem ne donas ian plezuron. Krogstad, havigu al mi iujn kaj ion por kiuj labori.

KROGSTAD. Tion mi ne fidas. Estas nenio alia krom ekzaltita virina grandanimeco, kiu eliras oferi sin mem.

LINDE. Ĉu vi iam konstatis, ke mi estas ekzaltita?

KROGSTAD. Ĉu vi efektive povus fari tion? Diru al mi, -- ĉu vi estas plene informita pri mia pasinteco?

LINDE. Jes.

KROGSTAD. Kaj ĉu vi scias, kiel ĉi tie oni rigardas min?

LINDE. Antaŭ nelonge vi donis al mi la impreson, ke kun mi vi estus fariĝinta alia homo.

KROGSTAD. Pri tio mi estas certa.

LINDE. Ĉu ne eblus ankoraŭ?

KROGSTAD. Kristine; -- tion vi diras tute intence! Jes, vi faras. Mi vidas tion laŭ via esprimo. Ĉu vi do efektive kuraĝas --?

LINDE. Mi bezonas iujn, por kiuj esti patrino; kaj viaj infanoj bezonas patrinon. Ni du bezonas unu la alian. Krogstad, mi fidas je via baza kerno; -- kune kun vi mi ĉion kuraĝas.

KROGSTAD (prenas ŝiajn manojn). Dankon, dankon, Kristine; -- nun mi montru, ke mi scipovu restarigi min ankaŭ en la okuloj de aliuloj. -- Ho, sed mi forgesis --

LINDE (aŭskultas). Ts! La Tarantelo! Foriru, foriru!

KROGSTAD. Kial? Kio estas?

LINDE. Vi aŭdas la dancon tie supre? Kiam ĝi estos finita, ni povos atendi ilin.

KROGSTAD. Nu ja, mi foriros. Ĉio estas ja vana. Kompreneble vi ne scias pri la paŝo, kiun mi faris kontraŭ Helmer.

LINDE. Jes, Krogstad, mi scias pri ĝi.

KROGSTAD. Kaj tamen vi kuraĝus --?

LINDE. Mi bone komprenas al kia ago malespero povas peli homon kiel vi.

KROGSTAD. Ho, se mi povus igi tion nefarita!

LINDE. Tion vi povus; ĉar via letero ankoraŭ kuŝas en la skatolo.

KROGSTAD. Vi estas certa?

LINDE. Tute certa; sed --

KROGSTAD (rigardas ŝin explore). Ĉu tiel por kompreni? Vi volas savi vian amikinson je kiu ajn prezo. Diru malkaŝe. Ĉu tiel estas?

LINDE. Krogstad; tiu kiu unu fojon vendis sin mem pro aliuloj, tion ne denove faros.

KROGSTAD. Mi repostulos mian leteron.

LINDE. Ne, ne.

KROGSTAD. Certe jes; kompreneble; mi atendas ĉi tie ĝis Helmer venos; mi diros al li, ke li redonu al mi mian leteron, -- ke nur temas pri mia maldungo, -- ke li ne legu ĝin.

LINDE. Ne, Krogstad, vi ne revoku vian leteron.

KROGSTAD. Sed diru al mi, ĉu vere ne estas pro tio, ke vi decidis rendezuon ĉi tie?

LINDE. Jes, en la unua paniko; sed nun tagnokto interpasis, kaj estas nekredeblaj aferoj, kiujn mi dum tiu tempo vidis en tiu ĉi hejmo. Helmer nepre ĉion eksciis; tiu malfeliĉiga sekreto devas esti malkaŝita; devas veni kompleta klarigo inter la du; ili ne povas daŭrigi en tiu reto de sekretigo kaj pretekstoj.

KROGSTAD. Nu jes; se vi do tion volas riski --. Sed ion mi almenaŭ povas fari, kaj tion mi faru tuj --

LINDE (aŭskultas). Rapidu! Foriru, foriru! La danco estas finita; ni ne plu estas sekuraj, eĉ ne momenton.

KROGSTAD. Mi atendas vin malsupre.

LINDE. Jes, faru; vi devas akompani min al la pordo.

KROGSTAD. Tiom nekredeble feliĉa mi neniam antaŭe estis.

(Li foriras tra la ekstera pordo; la pordo inter la sidĉambro kaj la antaŭĉambro restas malfermita)

LINDE (iom ordigas kaj metas siajn elirvestojn pretaj). Kia ŝanĝo! Jes, kia ŝanĝo! Homoj por kiuj labori, -- por kiuj vivi; hejmo en kiu krei hejmecon. Nu, mi vere eklaboru -- Ke ili baldaŭ venu -- (aŭskultas) Aha, tie ili estas. Ekvestiĝi. (surmetas ĉapelon kaj mantelon)

(La voĉoj de \_Helmer\_ kaj \_Nora\_ aŭdiĝas ekstere; ŝlosilo turniĝas, kaj \_Helmer\_ kondukas \_Nora\_ preskaŭ perforte en la antaŭĉambron. Ŝi estas vestita en la itala kostumo kun granda, nigra ŝalo super si; li estas en festena vestaro kun nebutonumita nigra domeno supere)

NORA (ankoraŭ ĉe la pordo, rezista). Ne, ne, ne; ne ĉi tien! Mi volas ree supren. Mi ne volas foriri tiel frue.

HELMER. Sed karega Nora --

NORA. Ho, mi petegas vin, Torvald; mi petas vin elkore, -- nur unu horon ankoraŭ!

HELMER. Eĉ ne unu minuton, mia dolĉa Nora. Vi scias, ke estis interkonsento. Jen jen; en la ĉambron; aŭ vi malvarmumiĝos.

(Li kondukas ŝin malgraŭ ŝia kontraŭstaro, iom puŝetante en la sidĉambron.)

LINDE. Bonan vesperon.

NORA. Kristine!

HELMER. Nu do, sinjorino Linde, vi ĉi tie tiom malfrue?

LINDE. Jes, pardonu; mi ege volis vidi Nora kostumita.

NORA. Ĉu vi sidis ĉi tie min atendante?

LINDE. Jes; bedaŭrinde mi ne venis sufiĉe frue; vi jam estis supre; kaj mi ne volis hejmeniri antaŭ ol mi vin vidis.

HELMER (forprenas la ŝalon de Nora). Jes, bone rigardu ŝin. Mi opinius, ke ŝi valoras esti rigardata. Ĉu ŝi ne estas ĉarma, sinjorino Linde?

LINDE. Jes, vere ŝi estas --

HELMER. Ĉu ŝi ne estas mirinde delikata? Tio estis ankaŭ la komuna opinio de la festenanoj. Sed terure obstina ŝi estas, -- la dolĉa etulino. Kion ni faru pri tio? Imagu, mi preskaŭ devis uzi forton por kunvenigi ŝin.

NORA. Ho, Torvald, vi pentos pri tio, ke vi ne permesis al mi eĉ nur duonan horon pli.

HELMER. Jen, vi aŭdas, sinjorino. Ŝi dancas sian Tarantelon, -- faras bruegan sukceson, -- meritan, -- kvankam estis en la esprimado eble iom tro da natureco; mi opinias, -- iom pli ol laŭ strikta mezuro estus konforma al la postuloj de arto. Sed tamen! La ĉefa afero estas, -- ŝi sukcesas; ŝi faras bruon sukceson. Ĉu mi post tio lasu ŝin resti? Redukti la impreson? Ne dankon; mi prenis mian ĉarman kaprean knabinecon -- kaprican kaprean knabinecon, mi povus diri -- sub la brakon; rapidan rondiron tra la salono; kliniĝon al ĉiuj flankoj, kaj -- kiel oni diras en lingvo de romanoj -- la bela vido malaperis. Finalo ĉiam kreu efekton, sinjorino Linde; sed \_tion\_ mi ne kapablas komprenigi al Nora. Puf, estas varme ĉi tie. (ĵetas la domenon sur seĝon kaj malfermas la pordon de sia ĉambro) Kio? Estas mallume. Nu ja; kompreneble. Pardonu -- (li tien eniras kaj ekbruligas kelkajn lumojn)

NORA (flustras rapide kaj senspire). Nu?!

LINDE (mallaŭte). Mi parolis kun li.

NORA. Kaj jen --?

LINDE. Nora, -- vi devas diri ĉion al via edzo.

NORA (senvoĉe). Mi sciis.

LINDE. Vi ne havas kaŭzon por ion timi flanke de Krogstad; sed paroli vi devas.

NORA. Mi ne parolos.

LINDE. Do parolos la letero.

NORA. Dankon, Kristine; mi nun scias, kio estas farenda. Ts --!

HELMER (revenas). Nu, sinjorino, ĉu vi nun admiris ŝin?

LINDE. Jes; kaj nun mi volas diri bonan nokton.

HELMER. Ho, jam nun? Ĉu estas via, tiu trikaĵo?

LINDE (prenas ĝin). Jes; dankon; mi preskaŭ forgesis ĝin.

HELMER. Do vi trikas?

LINDE. Jes ja.

HELMER. Sciu, vi devus prefere brodi.

LINDE. Nu? Kaj kial?

HELMER. Ĉar estas multe pli bele. Rigardu; oni tenas la brodaĵon tiel per la maldekstra mano, kaj per la dekstra oni kondukas la kudrilon -- tiel -- etende en longa kurbo; ĉu ne --?

LINDE. Jes, povas esti --

HELMER. Sed kontraŭe triki -- neniam fariĝas alie ol malbele; rigardu; la kunprematajn brakojn, -- la trikilojn, kiuj iradas supren kaj malsupren; -- estas io ĉineca ĉe tio. -- Ah, estis vere bonega ĉampano, per kiu oni regalis nin.

LINDE. Nu, bonan nokton, Nora, kaj ne plu estu obstina.

HELMER. Bona konsilo, sinjorino Linde!

LINDE. Bonan nokton, sinjoro direktoro.

HELMER (akompanas ŝin al la pordo). Bonan nokton, bonan nokton; mi esperas, ke vi venos sekure hejmen? Mi tiel volonte --; sed ne estas ja longa distanco irenda. Bonan nokton, bonan nokton. (Ŝi foriras; li fermas la pordon malantaŭ ŝi kaj ree envenas) Jen, jen; fine ni sukcesis eligi ŝin. Ŝi estas terure teda, tiu homaĵo.

NORA. Ĉu vi ne estas tre laca, Torvald?

HELMER. Ne, tute ne.

NORA. Eĉ ne dormema?

HELMER. Absolute ne; kontraŭe mi sentas min treege vigla. Sed vi? Jes, vi efektive aspektas kaj laca kaj dormema.

NORA. Jes, mi estas tre laca. Nun mi volas baldaŭ dormi.

HELMER. Jen vidu; vidu! Estis do ĝuste de mi, ke ni ne pli longe restus.

NORA. Ho, estas ja ĝusta, ĉio, kion vi faras.

HELMER (kisas ŝin sur la frunto). Nun la alaŭdeto parolas kvazaŭ ĝi estus homo. Sed ĉu vi observis kiom gaja Rank estis ĉi-vespere?

NORA. Ĉu? Li estis? Mi ne trovis ŝancon paroli kun li.

HELMER. Ankaŭ mi preskaŭ ne; sed dum longa tempo mi ne vidis lin en tia bona humoro. (rigardas ŝin dum momento; poste li alproksimiĝas) Hm, -- estas do ĝue esti reveninta en sian propran hejmon; esti tute sola kun vi -- Ho, vi rava, alloga juna virino!

NORA. Ne rigardu min tiel, Torvald!

HELMER. Ĉu mi ne rigardu mian plej karan posedaĵon? Tiun admirindaĵon, kiu estas mia, sole mia, mia komplete.

NORA (paŝas al la alia flanko de la tablo). Ne parolu al mi tiel ĉi-nokte.

HELMER (sekvas). Vi ankoraŭ havas la Tarantelon en la sango, mi

rimarkas. Kaj tio igas vin eĉ pli loga. Aŭskultu! Nun la gastoj estas forirantaj. (pli mallaŭte) Nora, -- baldaŭ estos silente en la tuta domo.

NORA. Jes, mi esperas.

HELMER. Jes, ĉu ne, mia propra kara Nora? Ho, ĉu vi scias, -- kiam mi tiel estas kun vi en festeno, -- ĉu vi scias, kial mi tiom malmulte parolas kun vi, tenas min fore de vi, nur foje sendas al vi ŝtelitajn okulĵetojn, -- ĉu vi scias, kial mi faras tion? Estas ĉar mi imagas al mi, ke vi estas mia sekreta amatino, mia juna sekreta fianĉino, kaj ke neniu suspektas, ke estas io inter ni du.

NORA. Nu ja, ja, ja; mi ja scias, ke ĉiuj viaj pensoj estas ĉe mi.

HELMER. Kaj kiam ni estas ekirantaj, kaj mi metas la ŝalon ĉirkaŭ viajn delikatajn, junecajn ŝultrojn, -- ĉirkaŭ tiu mirinda kolkurbo, -- tiam mi imagas al mi, ke vi estas mia juna novedzino, ke ni ĵus venis de la geedziĝa ceremonio, kaj ke mi la unuan fojon kondukas vin en mian loĝejon, -- kaj ke mi la unuan fojon estas sola kun vi, -- tute sola kun vi, vi juna, tremanta delikataĵo! La tutan vesperon mi havis neniun sopiron krom vi. Kiam mi vidis vin impeti kaj logi en la Tarantelo, -- tiam mia sango bolis; mi ne plu kapablis elteni; -- tial mi kondukis vin ĉi tien malsupre tiom frue --

NORA. Iru nun, Torvald! Foriru de mi. Mi ne volas ĉion ĉi.

HELMER. Kion tio signifas? Vi certe ludas petolulinon kun mi, Nonjo. Volas; volas? Ĉu mi ne estas via edzo --?

(Iu frapas la eksteran pordon)

NORA (ekskuiĝas). Vi aŭdis --?

HELMER (al la enirejo). Kiu estas?

RANK (ekstere). Estas mi. Ĉu vi permesas, ke mi envenu momenton?

HELMER (mallaŭte, kun irito). Hm, kion li volas nun? (laŭte) Momenton. (aliras kaj malfermas) Nu, estas ja ĝentile ke vi ne preterpasas nian pordon.

RANK. Ŝajnis al mi, ke mi aŭdas vian voĉon, kaj mi deziris enrigardi. (lasas la okulon vagi paseme ĉirkaŭen) Ak ja; tiuj karaj, konataj ĉambroj. Vi havas hejmeĉan varmon ene ĉe vi, vi du.

HELMER. Laŭaspekte vi inde ĝuis la etoson ankaŭ supre.

RANK. Bonege. Kial mi ne farus? Kial oni ne kunprenu ĉion en tiu ĉi mondo? Almenaŭ tiom kiom oni povas, kaj kiel eble plej longe. La vino estis altkvalita --

HELMER. Precipe la ĉampano.

RANK. Ĉu ankaŭ vi tion rimarkis? Estas preskaŭ nekredeble, kiom multe mi kapablis engluti.

NORA. Ankaŭ Torvald trinkis multe da ĉampano ĉi-vespere.

RANK. Ĉu?

NORA. Jes; kaj poste li ĉiam estas tiom amuza.

RANK. Nu, kial oni ne havu gajan vesperon post bone utiligita tago?

HELMER. Bone utiligita; pri tio mi bedaŭrinde ne rajtas laŭdi min.

RANK (frapas lian ŝultron). Sed pri tio mi ja rajtas!

NORA. Doktoro Rank, vi estas ja farinta sciencan ekzamenon hodiaŭ.

RANK. Ĝuste.

HELMER. Jen, jen; Nonjo parolas pri sciencaj ekzamenoj!

NORA. Kaj ĉu mi povas gratuli vin pri la rezulto?

RANK. Jes, vere vi povas.

NORA. Ĝi do estas bona?

RANK. La plej eble bona por kuracisto kiel por paciento, -- certeco.

NORA (rapide kaj esplorante). Certeco?

RANK. Kompleta certeco. Ĉu mi ne devus havi gajan vesperon poste?

NORA. Jes, vi ĝuste faris, doktoro Rank.

HELMER. Tion ankaŭ mi diras; se vi nur ne suferos pro tio morgaŭ.

RANK. Nu, en la vivo oni ja nenion ricevas senpage.

NORA. Doktoro Rank, -- ŝajnas ke vi multe ŝatas maskeradojn?

RANK. Jes, kiam estas sufiĉe multaj burleskaj maskoj --

NORA. Aŭskultu; kio ni du estu en la venonta maskerado?

HELMER. Vi eta, frivolino, -- ĉu vi jam pensas pri la venonta!

RANK. Ni du? Jes, tion mi al vi diru; vi estu feliĉo-feino.

HELMER. Jes, sed eltrovu kostumon, kiu tion montras.

RANK. Lasu vian edzinon sin prezenti, tiel kiel ŝi staras kaj iras tra la mondo --

HELMER. Vere trafe dirite. Sed ĉu vi ne scias, kio vi mem volas esti?

RANK. Jes, mia kara amiko, pri tio mi estas tute certa.

HELMER. Nu?

RANK. En la venonta maskerado mi estos nevidebla.

HELMER. Jen stranga kaprico.

RANK. Ekzistas granda, nigra ĉapelo --; ĉu vi neniam aŭdis pri

la malaperiga ĉapelo? Per tiu oni sin kovros, kaj neniu onin vidos.

HELMER (kun subpremita rideto). Ne, jen vi pravas.

RANK. Sed mi ja tute forgesas, pro kio mi venis. Helmer, donu al mi cigaron, unu el la nigraj Havana.

HELMER. Kun plej granda plezuro. (prezentas ujon)

RANK (prenas unu kaj tranĉas la pinton). Dankon.

NORA (frotas alumeton). Permesu al mi doni al vi fajron.

RANK. Dankon pro tio. (Ŝi tenas por li la alumeton; li ekbruligas la cigaron) Kaj nun, adiaŭ!

HELMER. Adiaŭ, adiaŭ, kara amiko!

NORA. Dormu bone, doktoro Rank.

RANK. Dankon por tiu deziro.

NORA. Deziru al mi la samon.

RANK. Al vi? Nu ja, ĉar vi tion volas --. Dormu bone. Kaj dankon pro la fajro. (Li kapsalutas al ambaŭ kaj foriras)

HELMER (mallaŭte). Li trinkis konsiderinde.

NORA (distrite). Eble.

(\_Helmer\_ prenas el la poŝo sian ŝlosilaron kaj iras en la antaŭĉambron)

NORA. Torvald -- kion vi intencas tie?

HELMER. Mi devas malplenigi la letterskatolon; ĝi estas tute plena; ne estos loko por la gazetoj morgaŭ frue --

NORA. Ĉu vi intencas labori ĉi-nokte?

HELMER. Vi ja scias, ke mi ne volas. -- Kio estas tio? Iu fuŝis la seruron.

NORA. La seruron --?

HELMER. Jes, certe, tiel estas. Kio povas esti? Mi ne kredus, ke la servistinoj --? Tie kuŝas rompita harpinglo. Nora, ĝi estas via --

NORA (rapide). Do devas esti unu el la infanoj --

HELMER. De tio vi devas vere dekutimigi ilin. Hm, hm; -- jen, mi tamen sukcesis malŝlosi ĝin (elprenas la enhavon kaj vokas en la kuirejon) Helene! -- Helene; estingu la lampon en la koridoro.

(Li ree eniras en la sidĉambron kaj fermas la pordon de la antaŭĉambro)

HELMER (kun la leteroj en la mano). Jen. Rigardu kiel amasiĝis. (trafoliumas) Kio estas tio?

NORA (ĉe la fenestro). La letero! Ho ne, ne, Torvald!

HELMER. Du vizitkartoj -- de Rank.

NORA. De doktoro Rank?

HELMER (rigardas ilin). \_Doctor medicinæ Rank\_. Ili kuŝis plej supre; verŝajne li enmetis ilin, kiam li foriris.

NORA. Ĉu estas io sur ili?

HELMER. Estas nigra kruco super la nomo. Rigardu. Estas vere tremiga kaprico. Tio aspektas ja, kvazaŭ li anoncus sian propran morton.

NORA. Li ja tion faras.

HELMER. Kion? Ĉu vi ion scias? Ĉu li diris ion al vi?

NORA. Jes. Kiam tiuj kartoĵoj venas, li nin fine adiaŭis. Li volas enfermi sin kaj mortti.

HELMER. Mia malfeliĉa amiko. Mi ja sciis, ke mi lin ne longe havus. Sed tiom frue --. Kaj li sin kaŝas kiel vundita besto.

NORA. Kiam tio \_devas\_ okazi, tiam estas plej bone, ke ĝi okazu senvorte. Ĉu ne, Torvald?

HELMER (iras tien kaj reen). Li estis kvazaŭ kun-kreskinta kun ni. Mi preskaŭ ne kapablas imagi lin for. Li, kun siaj suferoj kaj sia soleco, donis kvazaŭ nuban fonon al nia sun-plena feliĉo. -- Nu, eble estas pli bone tiel. Almenaŭ por li. (haltas) Eble ankaŭ por ni, Nora. Nun ni du estas komplete lasitaj unu al la alia. (ĉirkaŭbrakas ŝin) Ho vi, mia amata edzino; ŝajnas al mi, ke mi ne povas vin teni sufiĉe firme. Sciu, Nora, -- multfoje mi deziras, ke superpenda danĝero minacus vin, por ke mi povus riski vivon kaj sangon kaj ĉion, ĉion por vi.

NORA (sin deŝiras kaj diras forte kaj decide). Nun vi legu viajn leterojn, Torvald.

HELMER. Ne, ne; ne ĉi-nokte. Mi volas esti ĉe vi, mia amata edzino.

NORA. Kun la mortpenso pri via amiko --?

HELMER. Vi pravus. Tio skuis nin ambaŭ; malbeleco venis inter nin; pensoj pri morto kaj dissolviĝo. Ni liberiĝu de tio. Ĝis tiam --. Ni retiriĝu ambaŭ al la sia.

NORA (ĉirkaŭbrakante lian kolon). Torvald, -- bonan nokton! Bonan nokton!

HELMER (kisas ŝin sur la frunton). Bonan nokton, vi mia eta kantbirdo. Dormu bone, Nora. Nun mi tralegos la leterojn.

(Kun la paketo li iras en sian ĉambron kaj fermas la pordon malantaŭ si)

NORA (kun frenezaj okuloj, palpas ĉirkaŭe, kaptas la domonon de \_Helmer\_, volvas ĝin ĉirkaŭ sin kaj flustras rapide, raŭke kaj intermite). Lin neniam plu vidi. Neniam. Neniam. Neniam. (ĵetas la ŝalon sur la kapon) Ankaŭ neniam plu vidi la infanojn. Eĉ ne ilin. Neniam; neniam. -- Ho ve, la glacifrosta, nigra akvo. Ho, la senfunda --; tio --. Ho, se nur estus finite. -- Nun li havas ĝin; nun li ĝin legas. Ho ne, ne, ankoraŭ ne. Torvald, adiaŭ, vi kaj la infanoj --

(Ŝi volas kuri eksteren tra la antaŭĉambro; samtempe



\_Helmer\_ abrupte malfermas la pordon de sia ĉambro kaj staras tie kun malfermita letero en la mano.)

HELMER. Nora!

NORA (krias laŭte). Aj --!

HELMER. Jen kio? Ĉu vi scias, kion diras tiu letero?

NORA. Jes, mi scias. Lasu min iri! Lasu min eliri!

HELMER (retenas ŝin). Kien vi volas?

NORA (provas liberigi sin). Vi ne savu min, Torvald!

HELMER (ekskuita stumblas malantaŭen). Vero! Estas vero kion li skribas? Terure! Ne, ne; ne eblas ke tio estu vero.

NORA. Estas vero. Mi amis vin super ĉio en la mondo.

HELMER. Ba, ne prezentu stultajn evitemajn respondojn.

NORA (paŝon pli proksimen). Torvald --!

HELMER. Vi malfeliĉiga, -- kion vi entreprenis!

NORA. Lasu min foriri. Vi ne portu tion por mi. Vi ne prenu tion sur vin.

HELMER. Neniu komediaĵo. (ŝlosas la pordon de la antaŭ-ĉambro) Tie ĉi vi restu kaj estu responda pri viaj faroj. Ĉu vi komprenas, kion vi faris? Respondu! Ĉu vi komprenas?

NORA (rigardas lin sendeturne, kaj diras per rigida esprimo). Jes, nun mi komencas ĝisfunde kompreni.

HELMER (marŝas tien kaj reen). Ho ve, al kia teruro mi vekiga. En ĉiuj tiuj ok jaroj, -- ŝi, kiu estis mia plezuro kaj fiero, -- hipokrita, mensogema, -- ankoraŭ pli terure, krima! -- Ho, la senfunda abomenaĵo kaŝita en tio! Fi, fi!

(\_Nora\_ silentas kaj rigardas lin sendeturne.)

HELMER (haltas antaŭ ŝi). Mi devus esti suspektinta, ke io tia okazus. Mi devus esti antaŭvidinta tion. Ĉiujn tiujn facilanimajn principojn de via patro --. Silentu! Ĉiujn tiujn facilanimajn principojn de via patro vi heredis. Neniun religion, neniun moralon, neniun devosenton --. Ho ve, kiom mi estas punata por indulgi lin. Por vi mi tion faris; kaj tiel vi rekompencas min.

NORA. Jes, tiel.

HELMER. Nun vi ruinigis mian tutan feliĉon. Vi perdigis al mi mian tutan estontecon. Ho, estas terure pripensi. Mi estas sub la potenco de senskrupula homo; li povas agi kontraŭ mi kiel al li plaĉas, postuli de mi kion ajn; ordoni, komandi super mi laŭ siaj kapricoj; mi ne kuraĝos grumbli. Kaj tiom mizere mi devas sinki kaj pereji pro la kulpo de facilanima virino!

NORA. Kiam mi estos ekster ĉi tiu mondo, vi estos libera.

HELMER. Ho, neniujn gestojn. Tiajn frazojn ankaŭ via patro havis pretaj. Kio utilis por mi, ke vi estus ekster ĉi tiu mondo, kiel vi diras? Neniom por mi tio utilis. Li povas tamen diskonigi la aferon; kaj se li tion faros, oni suspektos, ke mi sciis pri via krima ago. Oni eble kredos, ke mi staris malantaŭe, -- ke estas mi,

kiu instigis vin! Kaj pro ĉio ĉi mi povas danki vin, vin, kiun mi portis sur la manoj tra nia tuta edzeco. Ĉu vi nun komprenas kion vi faris kontraŭ mi?

NORA (kun malvarma trankvilo). Jes.

HELMER. Tio estas tiom nekredebla, ke mi ne kapablas klare teni la penson. Sed ni devas iel nin aranĝi. Deprenu vian ŝalon. Deprenu ĝin, mi diras! Mi devas iamaniere kontentigi lin. Je kia ajn kosto ni devas prisilenti la aferon. -- Kaj pri vi kaj mi devas aspekti kvazaŭ ĉio estus kiel antaŭe. Sed kompreneble nur en la okuloj de la mondo. Sekve vi daŭre restos en la domo, memkompreneble. Sed la infanojn vi ne rajtas eduki; ilin mi ne kuraĝas konfidi al vi --. Ho, diri tion al ŝi, kiun mi tiom alte amis, kaj kiun mi ankoraŭ --! Nu, devas esti fino. De nun ne plu temas pri feliĉo; nun temas pri savo de la restaĵoj, la pecoj, la ŝajno -- (oni sonorigas)

HELMER (ekskuiĝas). Kio estas? Tiom malfrue. Ĉu la plej terura --? Ĉu li --? Kaŝu vin, Nora! Diru ke vi estas malsana.

(\_Nora\_ restas staranta senmove. \_Helmer\_ iras kaj malfermas la pordon de la antaŭĉambro)

ĈAMBRISTINO (duone vestita, en la antaŭĉambro). Jen venis letero al sinjorino.

HELMER. Donu ĝin al mi. (kaptas la leteron kaj fermas la pordon) Jes, estas de li. Vi ne havu ĝin; mi mem legos ĝin.

NORA. Legu vi.

HELMER (ĉe la lampo). Mi preskaŭ ne kuraĝas. Eble ni estas perditaj, ambaŭ. Ne; mi \_devas\_ scii. (malfermas haste la leteron; perokule trakuras kelkajn liniojn; rigardas enmetitan paperfolion; krio de ĝojo:) Nora!

(\_Nora\_ rigardas lin demande)

HELMER. Nora! -- Ne; mi devas denove legi unu fojon. -- Jes, jes; tiel estas. Mi estas savita! Nora, mi estas savita!

NORA. Kaj mi?

HELMER. Ankaŭ vi kompreneble; ambaŭ ni estas savitaj, vi kaj mi. Rigardu. Li resendas al vi la ŝuldateston. Li skribas, ke li bedaŭras kaj pentas --; ke feliĉa ŝanĝo en lia vivo --; Pa, estas indiferenta tio, kion li skribas. Ni estas savitaj, Nora! Neniu povos fari al vi malbonon. Ho Nora, Nora --; ne, unue ni forigu ĉiun ĉi abomenaĵon el nia mondo. Mi rigardu -- (haste rigardetas al la ŝuldatesto) Ne, mi ne volas rigardi; por mi poste ĉio estu nenio krom sonĝo. (disŝiras la ateston kaj ambaŭ leterojn, ĵetas la tuton en la fornon kaj rigardas dum ili brulas) Jen, jen, nun ili ne plu ekzistas. -- Li skribis, ke vi de post Julvespero -- Ho, devis esti tri teruraj tagoj por vi, Nora.

NORA. Mi luktis severan batalon dum tiuj tri tagoj.

HELMER. Kaj suferis en angoro, kaj ne vidis alian eliron ol --. Ne; ni ne volas memori tiujn abomenindajn aferojn. Ni nur ĝoju kaj ripetu: Finite; estas finite! Aŭskultu min do, Nora, laŭaspekte vi ne konceptas: Estas finite. Kio tamen estas tiu -- tiu rigida esprimo? Ho, kompatinda, eta Nonjo, mi bone komprenas; vi ne vere kredas, ke mi pardonis vin. Sed jen mi faris, Nora; mi ĵuras al vi: Mi pardonis al vi ĉion. Mi ja scias, ke kion vi faris, tion vi faris el amo al mi.

NORA. Jes, vere.

HELMER. Vi amis min, kiel edzino devas ami sian edzon. Estas nur la rimedoj, kiujn vi ne kapablis prijuĝi. Sed ĉu vi kredas, ke vi al mi estas malpli kara pro tio, ke vi ne kapablas agi sendepende? Ne, ne, nur apogu vin al mi; mi konsilu vin; mi instruu vin. Mi ne estus viro, se ne ĝuste tiu virina senhelpeco igus vin duoble pli alloga en miaj okuloj. Ne prenu al vi la malkarajn vorton, kiujn mi diris al vi en la unua teruro, kiam ŝajnis kvazaŭ ĉio renversiĝis super min. Mi pardonis vin, Nora; mi ĵuras al vi, mi pardonis vin.

NORA. Mi dankas vin pro via pardono.

(Ŝi eliras tra la pordo dekstre)

